

1985 septembro

78a jaro

n-ro 957 (9)

aperas monate (escepte de aŭgusto)

esperanto

ISSN 0014-0635

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)
nieuwe binnenweg 176 — 3015 bj rotterdam — nederlando



Pli ol du mil
kongresanoj
en la dumiljara
Aŭgsburgo

Vi trovos

en viaj manoj la kongresan numeron. Per ĝi komenciĝas la redaktora jaro – iom malfacile, ĉar la UK finiĝis la 10an de aŭgusto, kiam la plimulto de la tekstoj devus jam esti en la kompostejo! La artikolo pri la Internacia Kongresa Universitato alvenis tro malfrue – eble feliĉe, ĉar ja ne estis sufiĉe da spaco! Ĝi aperos en oktobro. Kaj, antaŭ ol vi komencas la ĉeflegadon, ni sciigu, ke la revuo *Fonto* publikigos tiujn premiitajn verkojn de la Belartaj Konkursoj de UEA, kiuj ne aperos en posta numero de *Esperanto*.

Enhavo

- 141 70a Universala Kongreso de Esperanto: Solide sukcesa kongreso
- 142 Solena Inaŭguro: Por paco kaj kompreniĝo
Kongresa rezolucio: Por paco kun egaleco
- 144 Solena Malfermo: Tradicio kun literaturo
- 145 Komitataj kaj estraraj kunsidoj: UEA malfermas pordon por nova membrokategorio (Osmo Buller)
Telegramo de Unesko
- 146 Telegramo: Konferenco pri Sekureco kaj Kunlaboro en Eŭropo
- 147 Unua Ĝenerala Kunsido: Pli da publiko, malmultaj demandoj
- 148 Seminario pri informado: Kio ankoraŭ necesas (E. Symoens)
- 149 8a Esperantologia Konferenco: Vera diskuto ne eblis (Klaus Schubert)
Faka agado: Nova ILEI
- 150 Kongresa temo: Valora, sed tro vasta (William Auld)
- 151 Belartaj Konkursoj de UEA: Rezultoj
- 152 Tago de la Lernejo: UEA kaj ILEI sojle de kunlaboro
Fondaĵo Grabowski: Premioj por 1985
- 153 Junulara programo: Aktiva engaĝiĝo (Norberto Saletti)
- 154 Teatro: Unu kontentiga teatraĵo
- 155 Artaj aranĝoj: Jup' pli multe...
Kaj plie okazis...
- 156 22a Internacia Infana Kongreseto: Infanoj kaj cindrulino (Christopher Fettes)
- 157 41a Internacia Junulara Kongreso: Junulara jarfesto vigletosa kaj varienhava (Graham Cansdale kaj Derek Roff)
- 159 Kelkaj opinioj pri la UK
- 160 Kongreseroj...

La kovrilo

montras (de maldekstre) d-ron Kurt Waldheim, la antaŭan Ĝeneralan Sekretarion de Unuiĝintaj Nacioj, s-inon Waldheim kaj s-ron Grégoire Maertens, prezidanton de UEA. Maertens kaj Waldheim renkontiĝis la 7an de aŭgusto en la Ora Salono de la urbodomo okaze de la Aŭgsburga Pacofesto. En sia tiea festparolado d-ro Waldheim nomis la Aŭgsburgan Pacofeston "konsola pruvo pri tio, ke la homoj tra la generacioj povas venki fanatikismon kaj uzi toleremon". (Vd. ankaŭ paĝon 141).

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Telefona: (010) 36 15 39.

Aperas monate (escepte de aŭgusto).

Fondita en 1905 de M.P. Berthelot (1881-1910). **Legata en 102 landoj.**

Voĉlegata por blinduloj.

Redaktoro: Geoffrey Sutton.

Abonprezo varias laŭlande (Gld. 44; US \$ 18; GM 39; enoj 3300 ktp); petu informojn ĉe via landa asocio aŭ de la ĉi-supra adreso. Unuopa ekzemplero kostas 4,00 guldenojn.

Anonctarifo (gld.): 1 p. 1 400, 1/2 p. 740, 1/4 p. 400, 1/8 p. 240, 1/16 p. 150. Instancoj kaj entreprenoj de la Esperanto-movado rajtas rabaton de 50 %, Eksterakovrilaj anoncoj kostas duoble. Rabato por tuja ripeto 20%.

Banko: Bank Mees & Hope, Postbus 749, NL-3000 AS Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804).

Ned. poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (UEA).

Telegramadreso:
ESPERANTO ROTTERDAM.

Estraro de UEA

Prezidanto (financo, administrado): s-ro Grégoire Maertens, Prins Leopoldstr. 51, B-8310 Brugge, Belgio; ☎ (050) 35 49 35.

Vicprezidanto (esploroj, rilatoj kun UN): d-ro Humphrey Tonkin, Office of the President, State University College, Potsdam, NY 13676, Usono; ☎ (315) 265 6744.

Vicprezidanto (informado): s-ro Umeda Yosimi, Aobadai 2-15-10, Meguro-ku, Tôkyô, 153 Japanio.

Ĝenerala sekretario: d-rino Flóra Szabó-Felső, Zója u. 5/b VII, 22., H-7624 Pécs, Hungario; ☎ (72) 23 274.

Estrarano (planado, Jubilea Jaro, landa agado): d-ro Renato Corsetti, Colle Rasto, I-00039 Zagarolo, Italio; ☎ (06) 95 25 713.

Estrarano (eksteraj rilatoj, junularo): d-rino Barbara Despiney, 35 rue Maurice Ténine, F-94260 Fresnes, Francio; ☎ (1) 237 14 73.

Estrarano (kongresoj): s-ro Roland Lindblom, Stenbockens gata 109, S-136 62 Handen, Svedio; ☎ (08) 777 41 75.

Estrarano (kulturo, edukado): s-ro Baldur Ragnarsson, Sogavegur 170, IS-108 Reykjavík, Islando; ☎ (91) 3 73 01.

Estrarano (faka agado, aplikado de Esperanto): inĝ. Petăr Todorov, ul. Veĵen 2, ap. 10, BG-1421 Sofia, Bulgario; ☎ 65 52 43.

Solide sukcesa kongreso

Kiu epiteto plej taŭge priskribas la 70an Universalan Kongreson de Esperanto, kiu okazis de la 2a ĝis la 10a de aŭgusto en Aŭgsburgo? Eble la adjektivo "solida" taŭgas, kvankam ne tute plentrafe. Ĝojige, la nombro da aliĝintoj, 2 311 el 50 landoj, superis ne nur la buĝetitan kvanton, kio plej verŝajne heroldas



financan sukceson, sed ĝi superas ankaŭ la kvanton da kongresanoj, kiun oni dum la jardekoj post 1947 plej optimisme atendis en tiu mondparto. La plej lasta komparebla Universala Kongreso estas tiu de Hago en 1964, kiu allogis 2 512 aliĝintojn. Eventuale tiaj konkretaj ciferoj pli precize signas la staton de la movado, ol pli abstraktaj prijuĝoj.

La plej grava scenero, super kiu ne regas la Loka Kongresa Komitato, sed kiu ja provizas la kongreson per ĝia fono, estas la vetero. La suno bonvolis brili preskaŭ dum la tuta semajno, kun ne malmulte da varmo. Unu tago tamen vidis preskaŭ tuttagan pluvon, foje tiel fortan, ke ĝi ĝenis la laboron de kunvenoj.

La ĉefurbestro de Aŭgsburgo, s-ro Hans Breuer, regalis 200 invititojn per akcepto en la bela renesanca urbodomo. Okaze de la specife aŭgsburga Pacofesto, kiu estis en la urbo mem feria tago – kaj por la kongresanoj la ekskursita tago – pluraj funkciuloj de UEA kaj aliaj denove partoprenis akcepton en la Ora Salono de la urbodomo, en kiu festparolis d-ro Kurt Waldheim, eksa Ĝenerala Sekretario de Unuiĝintaj Nacioj. Poste la prezidanto de UEA, s-ro Grégoire Maertens,

havis la okazon mallonge interparoli kun Waldheim, kiu esprimis sian bedaŭron, ke Esperanto ankoraŭ ne disvastiĝis pli multe.

Dank' al Stefan Maul, redakcia kunlaboranto de la loka *Augsburger Allgemeine*, kiu aperas en 325 mil ekzempleroj, antaŭ kaj dum la kongresa semajno tiu ĵurnalo regalis la loĝantojn de Aŭgsburgo per tuta aro da objektivaj artikoloj pri Esperanto kaj la UK. Sed aperis artikoloj ankaŭ en almenaŭ *Süddeutsche Zeitung* (Sudgermana ĵurnalo, 325 mil ekzempleroj) la 10an de aŭgusto kaj samtage en *Münchner Merkur* (Munkena Merkuro, 184 mil ekzempleroj).

Oni laŭdis la formon de la kongresejo. La ĝicetoj bone funkciis per la dediĉa laboro de lokaj volontuloj. Aliflanke la loĝiga servo ekpaneis, kiam komencis alveni kongresanoj. Pluraj, kiuj mendis jam antaŭ monatoj, trovis, ke ili ankoraŭ ne havas ĉambron! Tamen, eĉ tion oni sukcesis rapide ĝustigi. Plaĉis al multaj la daŭre funkciantaj kongresaj bufedoj, kaj utila estis la kongresa restoracio kun sia agrabla ekstera teraso kaj menuo en Esperanto. La prezoj tamen por multaj estis pli surprize altaj, ol vere agrablaj. Ankaŭ la proksimeco de la hotelturo, en kiu troviĝis krome la komitatkunsida Salono Hodler, proponis plian restoracion kaj kafejon.

Enkonduka priskribo de la kongresa sceno ne estus kompleta sen aparte danki la anojn de la Loka Kongresa Komitato, kiuj tiel longe laboris por sukcesigi la plej grandan jaran manifestacion de la Esperantomovado: Rudolf Brand, Reinhard Fössmeier, Joachim Giessner, Josef Grabmeier, Armin Grötzner, Friedrich Hilpert, s-ino Irene Hohn, Jomo Ipfelkoffer, Anton Kribel, Ludwig Röhl, Erich Sandner, Michael Scherm, Siegfried Schlumberger, ges-roj Margarete kaj Hermann Schmid, Franz Spielmann kaj ges-roj Stefanie kaj Gerald Tucker.



Por paco kaj kompreniĝo

Ekster la Sporta Halo de Aŭgsburgo bedaŭrinde ne estis sufiĉe da loko por la flagoj de la ŝtatoj de ĉiuj aliĝintoj. En la halo bonvenigis la alvenantajn kongresanojn, diplomatojn kaj aliajn vigla muziko laŭ la loka gusto.

La Ĉefurbestro de Aŭgsburgo, s-ro Hans Breuer – kiu per sia Esperanta bonvenigo al la kongresanoj "preskaŭ faris nian festparoladon", kiel poste komentis la prezidanto de UEA – emfazis, ke la individua toleremo inter "simplaj civitanoj" estas la plej grava antaŭkondiĉo por "la granda paco". Li daŭrigis: "Oni ĉiam denove diskutas pri la senco kaj valoro de artefarita lingvo. Mi kredas, ke ĉi tiu mondkongreso en Aŭgsburgo denove konvinke montras, ke Esperanto estas tre vivanta lingvo. Esperanto estas la lingvo de tiuj homoj, kiuj havas la bonan volon konstrui pontojn, forigi antaŭjuĝojn kaj aktive servi por la interkompreniĝo kaj la paco."

Portis salutvortojn de d-rino Dorothee Wilms, Federacia Ministro pri Edukado kaj Scienco, s-ro W. Schüler, ministeria konsilisto. En la mesaĝo d-rino Wilms diris i.a. "... ĉar vi ĉi tie inter vi sukcese uzas Esperanton, vi montras al ĉiuj skeptikuloj la praktikan signifon de tiu Lingvo Internacia en la plej vera senco de la vorto. Tamen ne nur la praktika signifo de Esperanto gravas, sed ankaŭ la kun ĝi neforigeblaj ligitaj grandaj idealoj de la Esperanto-movado, kiuj troviĝas en la antaŭenigo de la popoloj, en la homa progreso kaj en la monda paco."

Ĉeestis la Inaŭguron ankaŭ s-ro Max Amling, deputito de la federacia parlamento, d-ro Rudolf Dörr, prezidanto de la ŝvaba registaro, d-ro Georg Simnacher, prezidanto de la distrikta parlamento de Ŝvabio, d-ro Ludwig Kotter, urbestro kaj referendaro pri kulturo de Aŭgsburgo, d-rino Ilse Lichtenstein-Rother, profesoro de Universitato de Aŭgsburgo.

Ĉar ni ĉi-jare denove ne kongresis en ĉefurbo, venis al la UK relative malmultaj diplomatoj. Komprene-

KONGRESA REZOLUCIO

Por paco kun egaleco

Universala Esperanto-Asocio, dum sia 70a Universala Kongreso, kunveninta en Aŭgsburgo, Federacia Respubliko Germanio, de la 3a ĝis la 10a de aŭgusto 1985 kun 2 311 partoprenantoj el 50 landoj,

traktinte pri la fundamentaj problemoj, kiujn nuntempe frontas internacia rilatado, kaj pri la problemoj, kiuj estas nuntempe komunaj por la homaro trans naciaj limoj,

notinte la iniciatojn kaj la atingojn okaze de Internacia Junulara Jaro,

konsiderinte, ke la jaro 1985 markas la 40an datrevenon de la fino de la Dua Mondmilito kaj de la fondo de Organizaĵo de Unuiĝintaj Nacioj,

deklaras

1. ke la agado komenciĝinta en la jaro 1985 subtene al la junularo estas daŭriginda kaj ke ĝi certe estos daŭrigata en la Esperanta komunumo;
2. ke la klopodoj protekti la naturan medion bezonas translimajn kunordigadon kaj kunlaboron de medioprotektantoj, al kio Esperanto povas kontri-

bui, kaj tial atentigas la koncernatajn asociojn kaj homojn utiligi Esperanton;

3. ke la klopodoj antaŭenigi internaciajn rilatojn en spirito de paco kaj egaleco kongruas kun la idealoj kaj kun la praktika agado de la Esperanta komunumo.

En ĉi tiu senco la agado de Unuiĝintaj Nacioj kaj de ĝiaj fakaj instancoj – unuavice Unesko – estas subteninda kaj subtenota ankaŭ en la estonteco fare de ĉiuj, kiuj, same kiel la esperantistoj, celas pli justajn rilatojn inter la homoj sen distingo pri la sociaj kaj politikaj sistemoj aŭ pri la forto de la unuopaj landoj.

La Internacia Lingvo Esperanto estas rigardenda kiel unu el la elementoj de tiu celado.

4. ke la rajto je paco estas unu el la fundamentaj homaj rajtoj, kiun oni ne pretervidu.

Pro tio la ĉiufanka haltigo de pormilitaj preparoj estas urĝa tasko kaj nepre paŝo sur la vojo al paco kaj por evito de tutmonda katastrofo.

Ĉar la strebo al paco estas nemalhavebla elemento de la idearo de la movado por la Internacia Lingvo Esperanto – kiel oni plej laste reasertis en ĉi tiu kongreso dum la Tago de la Paco, okazinta en la tago de la datreveno de la eksplodo de la unua atombombo en Hiroŝimo – la Esperanta komunumo aparte intense agados por realigi la celojn de Internacia Jaro de Paco, deklarita de la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj por la jaro 1986.



S-ro Guo Fenmin, Ambasadoro de Popola Respubliko Ĉinio, bonvenigas la esperantistaron al Ĉinio en 1986.

ble granda aplaŭdo bonvenigis la alparolon de la Ambasadoro de PR Ĉinio, s-ro Guo Fenmin, kies salutojn oni interpretis el la ĉina: "Pro tio, ke la ĉina registaro simpatias al Esperanto, Ĉinio sukcesis esti la gastiganto de la 71a Universala Kongreso de Esperanto... Ĉinio ludas pli kaj pli gravan rolon sur la internacia tereno kaj havas pli oftajn kontaktojn kun diversaj landoj. Tial ne nur la ĉina popolo bezonas pli bone koni la mondon, sed ankaŭ popoloj de diversaj landoj bezonas koni Ĉinion. La okazigo de la Universala Kongreso en tiu situacio sendube havos tre gravan signifon." La Inaŭguron ĉeestis ankaŭ la Unua Sekretario de la Ambasado de PR Ĉinio, s-ro Hong Shannan.

En bona Esperanto salutis unue la Vickonsulo de Aŭstrio, s-ino Wiedermann. Iom surpriza saluto estis tiu de la Ĝenerala Konsulo de Burkina Faso, prof. Walter Heubl, kiu alportis salutojn de la ambasadoro. Nome de Danlando salutis la Konsulo, s-ro Ernst Hansen. Ĉeestis la Unua Sekretario kaj Kultura Ataŝeo d-ro Attila Király de Hungario. Venis ankaŭ salutoj de la itala Ministro pri Eksteraj Rilatoj. Kiel kutime, la norvega registaro sendis salutojn pere de kongresano, ĉi-foje s-ro Tom Arbo Høeg. Atendindaj estis la salutoj de la Konsulo de Usono, s-ro Gregory Lynch, ĉar li ne mallonge parolis en tre bona, kvankam ĵus lernita Esperanto. Tia ago estas des pli inda, kiam ĝi venas de reprezentanto de unu el la tiel nomataj grandpotencoj. Fine de la relative mallonga listo de registaraj salutantoj venis la vico de eŭropa parlamentano d-ro Dieter Rogalla. La prezidanto de UEA petis ekstran aplaŭdon por la diplomatoj pro tio, ke ili respektis niajn principojn, alparolante la kongreson aŭ en la propra etna lingvo aŭ en la Internacia Lingvo. Finis la salutojn enmarŝo de la 39

geknaboj el 17 landoj de la Infana Kongreseto, akompanata de la aplaŭdo de la kongresanoj.

Bela momento en la Inaŭguro estis la intervalo, en kiu la ĥoro el Göggingen prezentis kune kun la orkestro elstare animlevan muzikon de Bethoven. Eble ne ĉiu kongresano sciis, ke tiun belan muzikpecon, "Himno de la paco", oni rebaptis la eŭropa himno. Nu, ni finfine estis tre profunde en la mezo de tiu kontinento.

Post tiu paŭzo festparolis d-ro Humphrey Tonkin, vicprezidanto de UEA. Li lerte traktis la temon de paco kaj kunlaboro, dirante i.a.:

"La sumoj investitaj je armiloj... estas en la plej bona okazo sumoj forĵetitaj: se la armiloj ne estas uzataj... Rigardu vian najbaron. Estas bona ebleco, ke vi per viaj impostoj kaj via laboro kontribuas ĉiujare pli grandan sumon por detrui tiun najbaron, ol vi elspezis por veni al tiu ĉi kongreso. Kaj same estas bona ebleco, ke via najbaro elspezas pli da mono por detrui vin, ol por komunikiĝi kun vi.

Ĉi tie ne temas pri dekstra politiko aŭ maldekstra politiko, pri la misfaroj de unu lando aŭ alia, sed pri tio ke ni ĉiuj – do la tuta homaro – misuzas la riĉaĵon de nia tero por semi malamikecon, kie devus esti amikeco, morton, kie devus esti vivo, malakordojn, kie devus esti kunlaboro.

Ĉu vere, tiu idealo menciita en la himno de Zamenhof, ke la popoloj faru en konsento harmonian ron-

Foto: Amri Wandel



don, estas vere neatingebla? Ĉu vanas nia idealo? Tio ne povas esti. Interkompreniĝo nepre pli bonas ol interbatalado, kaj tiu ĉi bela kongreso estas nepre pli pozitiva kontribuo al la progresigo de la homaro, ol armila konkurenco kaj reciproka akuzado...

Ke Unuiĝintaj Nacioj kaj Unesko kaj la aliaj instancoj foje montriĝas senpotencaj aŭ foje ne sukcesas alfronti la plej malfacilajn demandojn, tion ni ankaŭ bone scias. Ni kompreneble bone scias, ke ĝi ne solvis sian propran lingvan problemon, nek traktis adekvate la problemon de lingva egaleco kaj lingva diskriminacio. Tamen, ni devas agnoski – kaj indas agnoski en tiu ĉi periodo en ĝia historio, kiam Unui-

ĝintaj Nacioj estas pridubata kaj atakata – ke ĝi estas unu el niaj plej grandaj garantioj de paco. Ke por solvi internaciajn problemojn, oni turnos sin unue al vortoj anstataŭ fortoj, kaj al debato anstataŭ disbato. Kvardek jarojn post ĝia fondiĝo ni do salutas Unuiĝintajn Naciojn kaj agnoskas ĝin kiel fratan kaj fratinan organizon en la serĉado de internacia kompreniĝo kaj internacia paco.”

Mag. William Auld prezentis la kongresan temon ”Antikvo kaj moderno: Kion ŝanĝi kaj kion konservi?” Ĉirkaŭ tiu tempo iuj komencis foriri, kio levas la demandon, ĉu denove tiu komenca ceremonio fariĝas tro longa. Oni asertas, ke ĝenerale homo ne kapablas doni sian plenan atenton al afero pli longa ol tri kvaronojn de horo.

La ĝenerala sekretario de UEA, s-ino Flóra Szabó-Felső prezentis la skribe alvenintajn salutojn de la ambasadoro de Finnlando, de Hu Yuzhi (Hujucz) kaj Bakin, anoj de la Honora Patrona Komitato de UEA, de Chu Tunan, prezidanto de la ĉina societo Amikoj de Esperanto, kaj de Teo Jung, Honora Membro de UEA.

La Inaŭguron ĉeestis ankaŭ raportistoj de la Munkena kaj Ŝtata Radio- kaj Televidservoj kaj la internacia servo de FR Germanio Deutsche Welle. Per tio novaĵoj pri la Inaŭguro de la 70a Universala Kongreso de Esperanto en Aŭgsburgo atingis per satelito la redakciojn de 480 elsendstacioj. La kongreson partoprenis ankaŭ specialaj reprezentantoj de la Esperanto-fakoj de Radio Pekino kaj Radio Pollando.


SOLENA MALFERMO

Tradicio plus literaturo

La Solena Malfermo allogis proksimume duonon de la nombro de la kongresanoj, kiuj ĉeestis la Inaŭguron. Ĉi tio rimarkeble malbonigis la jam ne tute taŭgan akustikon.

Prezidis Umeda Yosimi, vicprezidanto de UEA. Salutis nome de la Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO) ties prezidanto Ian Jackson. Post tio komenciĝis la tradicia salutado de landaj asocioj: Marjorie Ellyard (Aŭstralio), Walter Klag (Aŭstrio), Ilse Jacques (Belgio), May Bijleveld (Brazilo), Albert Goodheir (Britio), Kunčo Vâlev (Bulgario), Jaromír Jermář kaj Magda Šaturová (Ĉeĥoslovakio), Zhang Qicheng (Ĉinio), Tove Bak (Danlando), Veikko Tikkanen (Finnlando), Helmut Klünder (FR Germanio), Hans Heinel (Germana DR), Maria Pontika (Greklando), Endre Baráth (Hungario), Farifte Saidi (Irano), Maire Mullarney (Irlando), Baldur Ragnarsson (Islando), Eldad Zalcman (Israelo), Carla de Lorenzi (Italio), Kikusima

Kazuko (Japanio), Mustafa Resulović (Jugoslavio), Anne Whittaker (Kanado), Libardo Mejía (Kolombio), Gim Inhong (Korea Resp.), Andrés Rodríguez González (Kubo), Monique Leider (Luksemburgio), Anthony Mercieca (Malto), Juan Jacobo Schmitter (Meksikio), C. Bossong-Singer (Nederlando), Sunfloro Bakka (Norvegio), Andrzej Kraszewski (Pollando), Fernando Costa (Portugalio), Edwin de Kock (Sudafriko), Karin Lindquist (Svedio), Didi Weidmann (Svislando), Catherine Schulze (Usono) kaj Alberto Solarz (Venezuelo). La anoncitaj salutontoj el Francio kaj Hispanio iel sukcesis maltrafi la malfer-



De maldekstre: Gaston Waringhien, Aldo de' Giorgi kaj William Auld dividas (ĉu beletran?) ŝercon.

man solenaĵon. Almenaŭ tri rumanaj esperantistoj sukcesis partopreni la kongreson, sed neniu el ili kuraĝis oficiale saluti. Aplaudon rikoltis la bela gesto, kiun faris la reĝisoro de tiu parto de la programero, kiam li inversigis la kutimon kaj petis la kongreson per aplaŭdo saluti la rumanan esperantistaron. Estas ankaŭ notinde, ke neniu venis al la kongreso por reprezenti la kelkmilan esperantistaron de Sovetunio.

D-ro André Albault, prezidanto de Akademio de Esperanto, anoncis la aperon de la festlibro *Li kaj ni*, 500-paĝa esperantologia esearo omaĝe al prof. Waringhien, kaj mallonge parolis pri la multflankeco de la genio de Waringhien. Kiam prof. Waringhien, kvazaŭ novice konfuzita, suriris la podion por akcepti ekzempleron de la libro, la tuta kongresanaro spontane leviĝis por longe aplaŭdi la nunan ĉefkorifeon de la Zamenhofa lingvo. Li mem diris nur unu-du simplajn frazojn, por plian fojon dividi la meritojn kun sia verk-frato Kalocsay.

Sekvis ne aparte longa parolado de la prezidanto de UEA, Grégoire Maertens, kiu skizis la nunan momenton en la vivo de UEA kaj ĝiajn planojn por kelkaj sekvaj jaroj, precipe en ligo kun la Centjara Jubileo de Esperanto.

Fine de la malferma solenaĵo parolis la poeto Edwin de Kock. Li inspire kaj elokvente memorigis pri la antaŭ nelonga apero de la monumenta *Esperanta antologio*, kiu inaŭguris la Jubilean Kolekton de UEA. De Kock rimarkis, ke en la salono sidas ne nur

la redaktoro de la volumego, sed ankaŭ la iniciatinto kaj eldoninto de la unua eldono, prof. Juan Régulo Pérez, kiun la kongresanaro aklame salutis.

Komuna kantado de "La espero" finis la duan kongresan solenaĵon.

KOMITATAJ KAJ ESTRARAJ KUNSIDOJ

UEA malfermas pardon por nova membro-kategorio

Al la plej okupataj kongresanoj certe apartenis la membroj de la Komitato de UEA, kiujn en Aŭgsburgo atendis tagordo kun 48 punktoj. Por trakti ilin la komitatanoj kunvenis unuafoje jam antaŭ la komenco de la Kongreso. Ili havis sep plenkunsidojn, inter kiuj estis la Unua Ĝenerala Kunsido, kiun ĉeestis ankaŭ membroj de UEA kaj tiel rekte partoprenis la traktadon de la Estrara Raporto pri la agado en 1984.

La plenkunsidoj postulis 17 horojn, dum kiuj la komitatanoj kompreneble devis rezigni pri partopreno en aliaj eroj de la kongresa programo – ofte pli interesaj ol ŝvitado super asociaj aferoj, se kredi la plendon de iuj membroj. Tio tamen ne estas ĉio: krom en pleno, la Komitato laboris ankaŭ en komisionoj, kies precizan nombron apenaŭ eblis kalkuli – temis pri minimume dudeko de ili. La komisionoj estis tiel produktemaj rilate rezoluciproponojn, ke drononte en daŭre kreskanta fasko da fotokopioj, kelkaj komitatanoj esprimis dubon, ĉu tiu produktemo ankoraŭ restas ene de prudentaj limoj. "Ju pli da papero, des malpli da vera laboro", filozofumis iu en la vestiblo de la hotelo, kie troviĝis la tradicia komitata Salono Hodler. Plimulto de la komisionaj proponoj povis esti traktata en plenkunsido nur fine de la semajno, kio naskis multe da hasto kaj ofte devigis la prezidanton admoni pri disciplino. Finfine iuj proponoj devis pro tempomanko esti transdonitaj al la Estraro. Tiu, kiu plej multe plendis pro malfruigo de la decidfarado, estis la Gazetara Servo. Ekz. la ĉefrezolucio de la Kongreso estis akceptita preskaŭ lastminute antaŭ la Fermo, tiel ke la Gazetara Servo ricevis ĝian finan tekston nur poste. Kaj tamen temis ĝuste pri tiu dokumento, per kiu la Kongreso turnas sin al la ekstera publiko kaj kiu devus esti liverita al la gazetaro kiel eble plej frue.

En Aŭgsburgo la Komitato ekhavis du novajn membrojn, nome Dai Song-en el Ĉinio kaj d-ron Victor Sadler el Nederlando, kiuj elektiĝis komitatanoj C por la resto de la deĵorperiodo. Estis elektita ankaŭ

Telegramo de Unesko

"En la momento kiam, sub la titolo "Antikvo kaj moderno", vi dediĉas viajn laborojn al tiu malfacila ekvilibro inter la prava respekto al la pasintaĵoj kaj la neprokrastebla bezono pri evoluo, mi volas bondeziri al via 70a Kongreso la plej grandan sukceson. La agado de via Asocio pritraktas samtempe la kreadon de originalaj verkoj kaj la disvastigon – dank' al la tradukado – de la tutmondaj literaturaj ĉefverkoj. Ĝi do senĉese troviĝas antaŭ delikataj elektoj: kiel pri-decidi "kion ŝanĝi, kion konservi?" La estetikaj kriterioj ŝanĝiĝas; la relativa graveco de la eventoj estas taksata malsame laŭ la epokoj kaj regionoj. La eblecoj por realigado ne ĉiam atingas la nivelon de la esperoj aŭ de la bezono. La internaciaj organizaĵoj ne povas proponi universalan elektokriterion, sed ili devas laŭeble provi kapti intereson de la publiko, instigi al konsciiĝo pri la graveco de la demando, kunigi la rimedojn necesajn por la konservado. Siaflanke, Unesko laboras por diskonigi kaj aprezi la grandajn atingojn de la pasinteco, inventari kaj kuraĝigi la konservadon de la kulturaj heredaĵoj, ĉu spiritaĵoj, ĉu materiaĵoj, ĉar ili estas la plej evidenta esprimo de la genio de la popoloj, por disvastigi la intelektajn kaj artajn valorojn, cele al reciproka pliriĉiĝo, por pluinstigi la kreivon kaj evoluon. Ĝiaj ŝtatoj-membroj tiamaniere disponas pri elementoj nemalhaveblaj por alpreni decidojn. Unesko tiele volas ja plue instigi la agadon de Asocio kiel la via, kiu favoras la reciprokajn konatiĝojn de la malsamaj popoloj kaj laboras por pli bona internacia kompreniĝo."

Amadou-Mahtar M'Bow,
Ĝenerala Direktoro

nova sekretario de la Komitato, Richard Hirsch. Temas pri funkcio, kiun oni enkondukis pasintjare en Vankuvero i.a. kun la tasko kunordigi la laboron de la komitataj komisionoj, tiel ke ili ne endormiĝu, kiam fermiĝas la Kongreso, por reviviĝi en la sekva, sed konstante pritraktu la laboron de UEA sur la koncerna kampo. Tiu celo, se plenumita, ebligus pli funde prepari decidojn kaj eviti troan hastadon dum la kongresa semajno.

Plej multe kaj kelkfoje eĉ tre akre diskutata afero en la aŭgsburgaj kunsidoj de la Komitato certe estis la financoj de UEA. La jaro 1984 estigis negativan saldon de 115 000 gld., kaj oni antaŭvidas deficiton ankaŭ ĉi-jare. Tio kompreneble tre maltrankviligis la Komitaton. Sekve ĝi instrukiis al la Estraro, ke ĝi pli strikte restu ene de la limoj de la buĝeto kaj reduktu

elspezojn, kiam montriĝas, ke la enspezoj ne atingas buĝetitan nivelon. Oni kritikis, ke la proponita buĝeto por 1986 (aperinta en nia junia n-ro) estas tro optimisma. Tial la Estraro prezentis novan buĝeton kun tranĉitaj el- kaj enspezoj – la lastaj pli draste ol la unuaj. La definitiva buĝeto antaŭvidas deficiton de 54 300 gld. t.e. 9 000 gld. pli ol la unua propono. Tion oni akceptis ne volonte, ĉar ju pli proksimiĝas la Jubilea Jaro, des pli da taskoj frontas la Asocio kaj tute aparte la Centra Oficejo, kiun la tranĉoj ĉefe tuŝas.

Kiel konkretan paŝon al partoprenigo de la junularo en la aktiva Esperanto-movado kaj gravan parton de la programo de UEA okaze de la Internacia Junulara Jaro eblas noti la akcepton de la nova regularo de TEJO. Ĝi ekvalidos la 1-an de januaro 1986 kaj nuligos la nunan statuton de TEJO el 1977 kaj la Interkonsenton de Beogrado el 1973. Tiu nova dokumento precizigas la rilatojn inter UEA kaj TEJO kaj difinas TEJO kiel integran parton de UEA.

Jam delonge la kunlaboro inter UEA kaj Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) estis nekontentiga, sed nun la situacio ekŝanĝiĝis. Pri tio atestas ankaŭ la komitata decido, kiu komisias la estraron pri edukado detale trakti kun la estraro de ILEI unuecan programon por eduki kursgvidantojn kaj i.a. prepari ekzamenregularon por ili.

La Komisiono pri Faka Agado detale diskutis la terminologian laboron. Ĝi konstatis, ke altkvalita apliko de Esperanto en scienco kaj tekniko havas fundamentan gravecon por la estonta pozicio de la lingvo. Tial necesas, ke la terminologio respondu al la necesa nivelo, kaj diletanteco kaj hazardeco malaperu de terminologia laboro. Sekve la Komitato rekomendas, ke en la Jubilea Jaro estu fondita Esperanta termino-normiga instituto por plibonigi kaj unuecigi la terminologian laboron kaj reprezenti Esperanton en internaciaj normigaj institucioj kiel i.a. ISO kaj Infoterm.

La Komitato ankaŭ komisiis la Estraron klare difinisan estontan strategion pri scienca eldonado. Tio ligiĝas kun la komuna decido de la estraroj de UEA kaj Hungara Esperanto-Asocio, farita en la UK, per kiu la du partioj nuligis sian kontrakton pri Scienca Eldona Centro (SEC) en Budapeŝto. La ĝisnuna organiza strukturo de SEC montriĝis neoportuna, pro kio necesas restrukturado. Kia estos la nova strukturo, estas ankoraŭ tro frue anticipi. Ekzistas i.a. ebleco, ke la funkcioj de SEC ne plu estu koncentritaj en unu loko kiel ĝis nun.

Informado estis aparte funde pritraktata, ĉar la Komitato povis utiligi la rikolton de la seminario por gvidantoj de landaj asocioj, okazinta tuj antaŭ la UK. La seminarion partoprenis 36 aktivuloj el 20 landoj. La Komitato donis sian subtenon al ĝia rezolucio, kiu emfazas la gravecon eduki, trejni kaj informi la respondeculojn sur ĉiuj niveloj de la movado. La Kom-

Telegramo

Konferenco pri Sekureco kaj Kunlaboro en Eŭropo

"Universala Esperanto-Asocio, kunvenante en Aŭgsburgo, sendas siajn salutojn al la finna registaro kaj al aliaj subskribintoj de la Fina Akto de Helsinko okaze de ties deka datreveno. La Fina Akto reprezentis signifan paŝon antaŭen en la internacia kunlaboro. En tiu senco ĝiaj celoj koincidas kun tiuj de la Esperanto-movado, kiu instigas kaj faciligas la kompreniĝon trans landaj kaj lingvaj limoj. Ni esperas, ke tia kompreniĝo vaste pliboniĝos en estontaj jaroj, ĉar ĝi konsistigas la plej bonan fundamenton de daŭra internacia paco."

La 31an de julio 1985

Grégoire Maertens,
Prezidanto de UEA

tato komisiis al la Estraro alvoki kaj plani komunajn informkampanjojn en diversaj landoj samtempe. La Estraro ricevis la taskon plifortigi la informan fakon de UEA, tiel ke ĝi funkciu kiel informagentejo, regule distribuante faktojn kaj novaĵojn pri Esperanto al la landaj asocioj kaj rekte al la gazetaro. (Por pliaj detaloj pri la seminario vidu aliloke en ĉi tiu numero.)

La Komitato akceptis proponon de la Komisiono pri Kultura Agado pri regulaj kulturforumoj, en kiuj beletristoj kaj aliaj artistoj, laborantaj per Esperanto, povu renkontiĝi por interŝanĝi spertojn kaj ideojn. Por pli vaste diskonigi niajn teatrajn grupojn kaj faciligi la laboron de tiuj, kiuj preparas artajn programojn por diversaj aranĝoj, oni decidis eldoni gvidlibron kun informoj pri ekzistantaj profesiaj kaj amatoraj Esperanto-teatroj kaj ilia repertuaro.

UEA havas ekde Aŭgsburgo du pliajn kunlaborantajn fakajn asociojn. Ili estas Esperanto-Propaganda Asocio de Oomoto (kategorio neneŭtrala) kaj Filozofia Asocio Tutmonda. Monda Turismo petis esti akceptita kiel aliĝinta faka asocio, sed la Komitato prokrastis decidi pri la afero, sekve Monda Turismo restas kunlaboranta faka asocio. La Komitato ricevis aliĝpeton ankaŭ de Kataluna Esperanto-Asocio, sed ĝi ne pretis trakti ĝin, kvankam ĝi notis kun laŭdo la viklecon de la agado de KEA. Leviĝis demando pri la nuna situacio de Esperanto en Rumanio. Ĉar diskuris kontraŭdiraj informoj pri ĝi, la Estraro estis taskita oficiale kontakti rumanajn instancojn por informiĝi pri la afero.

Aparta komisiono traktis kiel evoluigi niajn Universalajn Kongresojn. Laŭ ĝia propono la Komitato elektis Komisionon pri Kongresoj kun la tasko diskuti kaj diskutigi la verajn celojn kaj deziratajn atingojn

de Universalaj Kongresoj. La Estraro siavice definitive decidis, ke ni kongresos en Braĵtono (Britio) en 1989. Oni pristudas la eblecon kongresi en Roterdamo en 1988 kaj por la unua fojo en Afriko, eventuale en Abiĝano, en 1990.

Jen ni skize resumis la plej gravajn decidojn de la Komitato kaj Estraro de UEA. Mankas tamen unu, kiu meritas apartan atenton. La Komitato decidis starigi novan membrokategorion "Membro kun Gvidilo" (MG) eksperimente por la jaroj 1986-1988. La MG-kotizo estos ĉ. triono de la MJ-kotizo kaj por ĝi la membro ricevos ĉ. 100-paĝan depresaĵon de la Jarlibro kun informoj pri UEA kaj la movado ĝenerale, la librokatalogon kaj la Estraran Raporton kaj estos plenrajta Individua Membro de UEA. Oni aparte celas, ke la nova membrokategorio ligu al UEA esperantistojn, por kiuj la nuna MJ-kotizo estas tro alta, kiel ekz. gejunulojn, familianojn kaj personojn el landoj kun pagaj aŭ transpagaj problemoj. Ĉu la kategorio restos konstanta, tion oni kompreneble decidis fine de la eksperimenta periodo. La eksperimento ebligas, ke ĝuste en la Jubilea Jaro UEA havu inter siaj membroj kiel eble plej multajn ankaŭ el tiuj, kiuj ĝis nun devis resti ekster ĝi. Sekve la komitata decido pri la nova membrokategorio estas samtempe alvoko membriĝi kaj amase varbi por akcepti la duan jarcenton de Esperanto kun pli forta tutmonda organizaĵo.

Krom ŝviti en kunsidoj la komitatanoj havis ankaŭ sian festenan momenton. Vespere de la unua kunsidotago ili estis invititaj de ges-roj Deguti por bankedo en la Urbodoma Kelo. En la bankedo estis publikigita la estrara decido pri unuafoja distingo de la plej aktiva komitatano. Fred de Geus (Nederlando), kiu i.a. gvidas la aŭtomatigon de la Centra Oficejo kaj prizorgas la vendadon de uzitaj poŝtmarkoj favore al la Asocio, ricevis tiun honoron, kaj lia nomo sekve eniris la Oran Libron de la Komitato.

Osmo Buller

UNUA ĜENERALA KUNSIDO

Pli da publiko, malmultaj demandoj

La Unua Ĝenerala Kunsido okazis en la Salono Grabowski, kiu pleniĝis parte pro tio, ke la tuta Komitato mem kun sia tablaro okupis preskaŭ duonon de la ĉambro. Tiu kunsido jam de kelkaj jaroj donas ŝancon al la membroj de UEA demandi pri ĝia pasintjara laboro. Tamen, oni ne povas diri, ke ĉi-jare la afero tre taŭge iris, kvankam la nombro de la intereso estis pli kontentiga ol en la pasintaj jaroj.

La prezidanto de UEA en sia longa malferma skizo pri la stato de UEA, kiel ĝi estis prezentita en la Estrara Raporto por 1984 (vidu la ĉi-jaran junian numeron de *Esperanto*), emfazis, ke "la kreiva kritiko jam delonge estas akceptita en UEA".

Eble la parolvico de la publiko venis iom tro malfrue, eble oni venis ĉefe por aŭskulti, sed la manpleno da demandoj apenaŭ tuŝis la fundamentan laboron de UEA.

Adam Goralski, la fondinto de Fondaĵo Grabowski, demandis, ĉu kultura organizaĵo kiel UEA daŭre investu monon ekster la Esperanto-movado. Maertens respondis, ke UEA jes investas multajn milojn da guldenoj en la ĝenerala Esperanto-movado, sed, por ke tiuj rimedoj kresku, necesas investi ankaŭ ekster ĝi.

Leviĝis kritiko kontraŭ la estraro de Instituto Hodler '68, ĉar ĝi ne antaŭvidis la ŝanĝigon en la nederlanda dommerkato, kio nun kaŭzas al la Instituto foreston de likida mono.

S-ino van Veenendaal atentigis pri la konsilindeco aranĝi malgrandajn diskutgrupojn en la Universalaj Kongresoj laŭ la modelo de la UK en Stokholmo. Tiu

Foto: Jovan Ošap



(De maldekstre): vicprezidanto de TEJO M. Haase, estraranoj de UEA B. Despiney, R. Lindblom kaj B. Ragnarsson, vicprezidanto Umeda Y., ĝenerala sekretariino F. Szabó-Felső, prezidanto G. Maertens, ĝenerala direktoro S. Milojević, vicprezidanto H. Tonkin, d-ro H. Frank kaj estrarano R. Corsetti.

temo plurfoje revenis dum la kongreso i.a. lige kun ĝenerala interkoniĝo kun aliaj kongresanoj.

Du kongresanoj levis demandojn, kiuj rilatis al la situacio en Pollando. Al unu el tiuj demandoj Maertens respondis, ke estus insulte ne fidi al Pola Esperanto-Asocio pri la eblecoj organizi sukcesan Unversalan Kongreson en Varsovio en 1987.

SEMINARIO PRI INFORMADO

Kio ankoraŭ necesas

Du tagojn antaŭ la UK en Aŭgsburgo, la 31an de julio kaj la 1-an de aŭgusto 1985 okazis seminario pri informado, kiu ne okupiĝis pri la enhavo de nia informado, sed pri la elementoj, kiuj ebligas pli efikan kaj fruktodonan informadon.

La seminario celis iniciati daŭran kaj sisteman penslaboron ĉe ĉiuj aktivuloj sur ĉiuj niveloj por serĉi valoran respondon al la fundamenta demando: Kial nia movado ankoraŭ ne sukcesis konvinki la homojn, ke Esperanto kapablas solvi almenaŭ parton de la internacia komunika problemo.

La 36 partoprenintoj el 20 landoj konkludis:

1. Estas nepre necese **trejni**, praktike formi kaj informi la agemulojn sur ĉiuj niveloj de nia movado. Flandra Esperanto-Ligo, pro sia jam akirita sperto, estas petata pretigi en kunlaboro kun aliaj asocioj gvidlibron por gvidantoj de la Esperanto-movado kaj konsilaron pri trafaj informlaboroj.

2. La movado urĝe bezonas **servocentron por kadrokursoj** sur UEA-nivelo, por kolekti kaj ĝisdatigi ĉiujn spertojn jam disponeblajn, plani kursojn, proponi kaj kunordigi eksperimentojn ktp. kun la celo profitigi ĉiujn el la spertoj de aliaj kaj krei kunlaboreminter ĉiuj aktivuloj, trarompi la izolecon kaj tiel kuraĝigi multajn agantojn.

3. Por nia interna, reciproka informado, ni bezonas **"forumon"**, ĉu en la oficiala organo *Esperanto*, ĉu en aparta informilo.

4. Niaj aktivuloj kaj respondeculoj, kiuj plej ofte estas neprofesiaj bonvolemluloj, urĝe bezonas konsilojn por plibonigi la komunan laboron. Tial estas proponita verkado de malgrandaj, facile utiligeblaj kaj **praktikaj manlibroj kaj konsilaroj** pri ĉiuspecaj temoj, kiel ekz. la aperinta *Kiel rilati kun la gazetaro?* de G. Pirlot, kiel organizi ekspozicion, kiel organizi prelegon kaj kiel prelegi, kiel skribi artikolon, kiel organizi kongreson ktp.

5. Ĝusta kaj adekvata argumentado estas bazo de efika informado. Disaj artikoloj kaj broŝuroj jam ekzistas sur tiu kampo. Necesas **kolekti ĉiujn disponeblajn argumentojn** kaj kontraŭargumentojn rilate al Esperanto, trovi respondojn kaj verki strukturitan



Koridore diskutas (dekstre) ges-roj Woessink.

manlibron, en kiu la argumentoj estu sub rubrikoj, kun konsiloj rilate al la argumentado.

6. Estas grave, ke la informantoj konsciu pri kelkaj **elementaj psikologiaj leĝoj**. Tiurilate Claude Piron faris pioniran laboron. Necesas aldoni la rezultojn de tiu laboro.

7. Multaj bonintencaj planoj fiaskas pro manko de adekvata kaj adaptita strategio kaj malobservo de taktikaj donitaĵoj. Ni nepre petu **konsilojn de specialisto** pri modernaj metodoj, kiel ekz. enmerkatingo. Ni bezonas manlibron ankaŭ pri tiu temo.

8. Dum la seminarioj en Roterdamo kaj Bad-Saawrow (1981) oni difinis la **prioritatajn celgrupojn** por nia informado: a) amaskomunikajn mediojn, b) soci-politikajn mediojn, c) edukajn mediojn, ĉ) sciencajn kaj teknologiajn mediojn, d) turismajn mediojn, e) komercon kaj industrion, f) internaciajn neregistrajn organizojn. Nur por la eroj c kaj f jam ekzistas laborplanoj kaj detala priskribo de aplikebla strategio.

9. Ĉu la ĝeneralaj strukturoj de UEA ebligas efikan informadon? Ĉu ni disponas pri servo aŭ organo ĉe la kapo de UEA, **kiu nun povus gvidi ampleksan informkampanjon**, kiu povas kolekti kaj prilabori la individuajn kaj asociajn spertojn kaj eksperimentojn tra la mondo rilate al informado, pretigi materialon ktp.? La respondo ŝajnas esti negativa.

10. La **financaj aspektoj** de efika kaj ampleksa informado estas studendaj. Informado ne estas afero de kelkaj homoj. Bonvolu sendi reagojn, proponojn, konsilojn ktp. al la kunordiganto pri informado s-ro Edward Symoens, Putsesteenweg 131A, B-2180 Kalmthout, Belgio. Li serĉas kompetentajn kunlaborantojn por ĉiu menciita punkto. Kompreneble ankaŭ la redaktoro de *Esperanto* bonvenigos viajn reagojn.

Edward Symoens

Vera diskuto ne eblis

Se oni parolas kun neesperantistoj pri la UK, ili ofte havas iujn imagojn, kio ĝi devus esti. Unu el tiuj imagoj estas, ke ĝi temas pri Esperanto mem. Sed fakte nur kvar horojn oni en Aŭgsburgo dediĉis al esperantologio, paralele al deko da aliaj aranĝaĵoj.

Dum tiu mallonga tempo ses prelegantoj rigardis Esperanton de tre malsamaj flankoj. Tri parolis pri vortoj, unu pri frazoj, unu pri Esperanto kompare al ĝia plej nova ido kaj unu pri Esperanto kaj ĉio ĉirkaŭ ĝi. Pri malnovaj vortoj parolis d-ro István Szerdahelyi (Hungarujo), kiu analizis la vortojn de la Universala Vortaro. Li trovis, ke multaj vortoj, kiujn oni pro ilia etimo kaj ekstera formo facile klasas kiel latiniddevajn, fakte laŭ la signifa enhavo koincidas aŭ kun siaj slavaj fontoj, aŭ kun la slava uzo de la okcidentaj vortoj. D-ro Werner Bormann (FR Germanujo) analizis, kiel etnolingvaj manieroj kaj tendencoj kelkfoje pludaŭris ankaŭ en Esperanto, favorante jen vortojn el unu prestiĝa lingvo, jen el alia. Liaj tezoj ampleksis parte ankaŭ lingvouzon, parolturnojn kaj socilingvistikajn faktorojn. Ili montris, ke detala kaj zorga studado de tiu tereno povus alporti ankaŭ ekstermovade interesajn lingvistikajn trovaĵojn. D-ro Victor Sadler (Nederlando), inspirita de sia laboro en la komputtraduka projekto DLT, en tre sobra kaj nekonvencie elpensita maniero esploris la prepozician sistemon de Esperanto kaj montris, ke tia studo kondukas al translingve komparindaj rezultoj. La ideoj de Sadler estis nur la komenco de pli longa cerbumado pri Esperantaj funkciivortoj, kaj oni povas esperi, ke sekvos pli detalaj esploroj ankaŭ rilate al la ĝenerala esprimbezono de lingvoj.

Sur la fraza nivelo troviĝis la temo de inĝ. Félix García Blázquez (Venezuelo) pri la transitiveco de verboj respektive de agoj. Tiu temo celas al la kerno de la esenca distingo inter formo kaj signifo kaj povus riĉigi la esperantologian diskuton per unuarangaj rezultoj, pli altnivelaj ol tiuj de multaj etnolingvaj malklaraĵoj. Domaĝe do, ke la preleganto ne disponis pri la koncepta klarvido, kiun ĉi tia ambicia temo nepre premisas. Inundante siajn aŭskultantojn per terminoj, kiuj ne estis tuj evidentaj por la plejparte nefaka publiko, li implikiĝis ie inter sintakso kaj semantiko.

En mia propra prelego mi provis montri la diferencojn inter Esperanto kaj la interlingvo de DLT, variaĵo de Esperanto adaptita por esti uzata en komputa tradukado, kaj sugestis ke ambaŭ lingvoj bezonas malsaman gradon kaj malsaman specon de precizeco. Pro tio la DLT-lingvaĵo ne estas reformpropono por Esperanto, sed iros alian vojon, tamen intime ligitan kun la homuza Esperanto.

D-ro Detlev Blanke (Germana DR) uzis la terminon "planlingvo" kiel okazon enkadrigi Esperanton en la diversfunkciajn planlingvoprojektojn, internaciajn lingvojn, kontaktlingvojn ktp. Oni sentis, ke fone staris pli ampleksa esploro, el kiu Blanke referis nur parteton.

Post la kvarhora konferenco restis la ĝenerala kongresa sento de "ni-ne-havas-sufiĉe-da-tempo". Vera diskuto ne eblis, multaj ĉeestantaj esperantologoj havis alisalonajn devojn, aliaj, kiel Ryszard Rokicki (Pollando) prelegis en alia kadro, preskaŭ kaŝe kaj sen aŭskultantaro. Ĉu estus pli efike disigi la prelegojn en la kongresprogramo, samkiel por IKU? Ĉu estus pli dezirinde okazigi la konferencon aparte de la UK, kie oni havus la trankvilon koncentriĝi pri Esperanta lingvoscienco? Ĉu eblus pli celtrafe inviti prelegantojn? Kaj kion oni faras por publikigi la rezultojn, prefere ekster ol en la movado? Kaj, fine, kiam ni sentos nin maturaj por prezenti tian konferencon al la ĝenerala lingvistika sciencularo?

Klaus Schubert

FAKA AGADO

Nova ILEI

Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj okazigis sian 19an konferencon de la 22a ĝis la 29a de julio en Kungälv, okcidenta Svedio, sub la prezidanteco de Helmuth Sonnabend. Enskribiĝis 55 personoj el dek landoj.

En la komenco de la konferenco la prezidanto memorigis pri d-ro Mario Dazzini, kiu antaŭ nelonge forpasis kaj dum tiom da jaroj estis la ĝenerala sekretario de ILEI.

Krom la kutimaj enurbaj kaj regionaj vizitoj, okazis prelegoj rilate al Svedio: la lerneja sistemo, la lin-



El la nova estraro de ILEI (de maldekstre) Dazzini, Szerdahelyi kaj Symoens plus Ragnarsson.

gvo, la literaturo por infanoj post 1945 kaj moroj kaj kutimoj ĉe festoj. Dua grupo de prelegoj rilatis al Esperanto en la lernejoj. Harald Brown el Britio parolis pri la nova lerneja projekto, kiun li ellaboris, Humphrey Tonkin parolis pri la rolo de la instruado en la Esperanto-movado, kaj Lennart Åberg parolis pri aktivado per Esperanto inter infanoj. Enkondukan prelegon kun la titolo "English, yes, Esperanto, jes: lingvoj kiel partneroj" prezentis Helmuth Sonnabend. Poste oni traktis tiun temon en diskutgrupoj, kaj la finkunsido aprobis tiuteman rezolucion.

La ĉi-jaraj elektoj estis aparte gravaj, ĉar la estraro de ILEI nun estas preskaŭ tute nova: prof. István Szerdahelyi (prezidanto), Edward Symoens (vicprezidanto), Catina Dazzini (ĝenerala sekretario), Marin Bâcev (sekretario) kaj Bertil Andréasson (kasisto).

KONGRESA TEMO

Valora, sed tro vasta

Gvidate de William Auld, okazis tri sesioj dediĉitaj al diskutado pri la kongresa temo "Antikvo kaj moderno: Kion ŝanĝi, kion konservi?". En ĉiu sesio unu aŭ du invititaj parolantoj pritraktis faceton de la larĝa temo, kaj poste al la mikrofono venis kongresanoj el inter la ĉeestanta publiko, kiu nombris inter 100 kaj 200 personoj.

La temo estis tiel vasta, ke montriĝis neeble iel limigi ĝin aŭ atingi konkretajn konkludojn. Oni ne supozu tamen, ke la diskutado estis senvalora. La kontribuaĵoj de la ĉefparolantoj, kiel ankaŭ la pliparto de ĉiuj kontribuaĵoj, bone pritraktis kaj taksis la estontecon de la homa socio kaj de Esperanto mem en lumo de la pasinteco kaj de la nuntempaj rapidegaj ŝanĝiĝoj – precipe teknikaj kaj ekonomiaj –, kiuj sia-vice grave aliigas la socian vivon. Multaj ideoj tre saĝaj esprimiĝis, kaj espereble la ĉeestantoj estis kontentaj aŭskulti kaj pripensi ilin.

En la unua sesio, kiu okazis dimanĉon posttagmeze, parolis unue Gerrit Berveling el Nederlando. Kiel teologo li aliris la temon el vidpunkto de la religio, kaj konkludis, ke por la bonfarto de la homaro urĝe necesas, ke ĉiuj homoj plej serioze provu kompreni aliajn religiojn kaj mondkonceptojn, inkluzive tiujn plej apudajn. Sekvis lin d-ro Vilmos Benczik el Hungarujo. Li parolis pri la influo de teknikaj eltrovoj al la spirita kulturo. En la romano *Montara vilaĝo* de Ye Junjian oni legas pri "vilaĝa rakontisto" en Ĉinujo ankoraŭ dum la dudekaj jaroj de la nuna jarcento. Kiam aperis la presarto en Eŭropo, iuj homoj protestis, ke tia maniero produkti librojn estas "senhoma kaj senanima": ĉu kelkaj homoj hodiaŭ ne ri-



gardas iom simile la televidon? Al la demando, ĉu la tekniko estas amiko aŭ malamiko de la kulturo, Benczik respondis: "Ĝi povas esti ambaŭ samtempe". Poste d-ro Albert Goodheir (Britujo) substrekis la gravecon de la historio, refutante la tro oftan supozon, ke niaj antaŭuloj, nur pro la fakto, ke ili vivis antaŭ ni, estis malsaĝaj. Male, ĉiuj homoj en ĉiuj lokoj kaj ĉiuj tempoj estas samaj; la homoj de la ŝtonepoko estis primitivaj nur laŭ siaj iloj. Teorioj pri



La Solena Fermo en la Salono Zamen



”neevitebla progreso” ne plu estas respektindaj. Ni devas konservi la vivrimedojn kaj ne detrui ilin, kaj ni devas konservi la arton kaj literaturon de la pasinteco kaj ankaŭ tre grave la historion de nia movado.

Merkredon posttagmeze parolis d-ro Werner Bormann el FR Germanujo kaj Edwin de Kock el Sudafriko. Bormann parolis pri la ekonomio, precipe en Federacia Respubliko Germanujo, kaj pri polucio. Teknikaj ŝanĝigoj rezultigas malaperon de milionoj

Fotoj: Jovan Ošap



hof okazis sub la signoj de la ekologoj.

transiro al aliaj industrioj, ekzemple al aviadilkonstruado anstataŭ ŝipkonstruado, FR Germanujo sukcesis tiel, ke la tiea senlaboreco estas nur 9%.

El ekzemploj kiel tiuj de la antikvaj romianoj, la dumiljara urbo Aŭgsburgo, Afriko k.a., de Kock konkludis, ke la lingvoj moviĝas de loko al loko nur kiam ili estas truditaj, kvankam ne ĉiam per armiloj. Kompreneble, en la nova loko la lingvo daŭras pli longe ol la potenco de la trudinto. Laŭ li, la manko de granda sukceso de Esperanto klarigeblas per la fakto, ke ĝis nun neniu trudis ĝin al la mondo. La esperantistoj devus trudi ĝin, pere de la lernejoj.

Dum la tria sesio, okazinta vendredon posttagmeze, bedaŭrinde mankis en la ĉambro mikrofono, kaj sekve ne ĉiuj paroloj klare aŭdiĝis. Tio bedaŭrinde estas tro ofta fenomeno en niaj kongresoj, kiam volas kaj rajtas paroli homoj, kiuj ne estas spertaj pri la publika parolado. Malgraŭ tio, tri virinoj faris gravan kontribuon. Unue, s-ino Isobe Yukiko parolis pri ŝanĝigoj en la vivado de japanaj virinoj. Dum la pasintaj 40 jaroj tiu vivado multilate liberiĝis post jarcentoj de vira supereco sur ĉiuj kampoj. Virinoj komencas eniri gvidajn poziciojn. Tion la japanaj junulinoj jam akceptas, eĉ ne pensante danki la pionirajn virinojn, kies agado ebligis tion. Pri antropologiaj problemoj parolis s-ino Jane Edwards el Usono. La kulturojn ŝi rigardis antropologie, pro la tre granda migrado de rifuĝintoj, gastlaboristoj k.s. tra la mondo dum ekzemple la lastaj ducent jaroj. La efikoj de tio povas esti tre malsimilaj, sed ŝi ĉerpis ian modelon perspektivan de tri generacioj en Usono: la eniro en novan fremdan kulturon, la perdo de la malnova kaj la klopodo de tria generacio retrovi ankaŭ tiun kulturon, forpuŝitan de la gepatroj. Fine, s-ino Houkje Boersma-Hoekema el Nederlando revenis al la temo de la pozicio de la virino en la socio. Virino, kvankam ŝi povis esti „la nuko, sur kiu la kapo turniĝas”, dum jarcentoj estis rigardata kiel malsupera. Nun la situacio pliboniĝis, kaj la esperantistinoj devus sin turni al la diversaj virinaj organizaĵoj por efika kunlaboro.

Pri la estonteco de Esperanto parolis kelkaj kongresanoj. Ĝenerale sentiĝis forta emo konservi la klasikan lingvaĵon kaj nur tre atenteme enlasi novaĵojn.

William Auld

BELARTAJ KONKURSOJ DE UEA 1985

Rezultoj

Konkursis entute 142 verkoj de 87 konkursantoj, el kiuj la juĝkomisiono premiis la jenajn:

POEZIO: Unua premio: **Timothy Carr** (Britio)

pro *Vagonvojaĝo*; Dua premio: s-ino **Karolina Gilmore** (Britio) pro *Kaŝĉambro*; Tria premio: **Belonenko Evĵenij** (Sovetunio) pro *Markonkoj*.

PROZO: Unua premio: **M.J. Quesada** (Hispanio) pro *Punenda peko*; Dua premio egale al **M.J. Quesada** pro *Ensuĉo* kaj al **Bernard Aunis** (Francio) pro *Fabelo de Zamenio: La edzino de la diablo*; Tria premio: **Bernard Golden** (Hungario) pro *La komercisto*.

TEATRAĴO: Unua premio: **Stefan MacGill** (Nederlando) pro *Najbaroj*; Dua premio: **Karolina Gilmore** pro *Tepaŭzo*; Tria premio: s-ino **Ruth Culbert** (Usono) pro *Dolĉa Emilino*.

ESEO (Premio Luigi Minnaja): **Roberto Lloancy** (Francio) pro *Kongresa enigmo aŭ enigma kongreso*.

KANTO (Premio An-okin pri Kanto) ne estis aljuĝita.

INFANLIBRO DE LA JARO: *La eta princo* de Antoine de Saint-Exupéry en traduko de Pierre Delaire, eldonita de Kanada Esperanto-Asocio.

FOTOGRAFIO: Unua premio: **Stefan MacGill** pro *Poezia branĉo*; Dua premio: **Maeda Yonemi** (Japanio) pro *Portlando: Ek al ekskurso*; Tria premio egale al **Che Junhi** (Korea Respubliko) pro *Danco 85* kaj al **Tanaka Miyosi** (Japanio) pro *Himezi-Kastelo de ĉerizfloro*.

Laŭ decido de la Komitato de UEA, venontjare estos speciala pacpremio okaze de la Jaro de Paco.

TAGO DE LA LERNEJO

UEA kaj ILEI sojle de kunlaboro

En Aŭgsburgo UEA dediĉis por la kvara fojo apartan tagon en la kongresa semajno al taskoj kaj temoj rilataj al la instruado de Esperanto. Per tio la Tago de la Lernejo komencas akiri statuson de institucio kaj kvaliton de tradicio. La programon de la Tago organizis ĉi-foje, sub gvido de la Konsulta Komisiono de UEA pri Edukado, Zsuzsa Barcsay kaj Hermann Behrmann, kunlabore kun Gerald kaj Stefanie Tucker.

Ĉeestis la malfermon de la Tago reprezentanto de la Ministerio pri Kulturo de Bavario, s-ro Luchner, kiu bonvenige salutis la multnombran ĉeestantaron. Post enkonduko de Baldur Ragnarsson, estrarano de UEA pri kulturo kaj edukado, reprezentantoj el Ĉinio, Ruando, FR Germanio, Irano, Islando, Hungario kaj Pollando raportis pri la instruado de Esperanto en siaj landoj en rilato kun la ĉeftemo de la Tago: "Kiel plivastigi la instruadon de Esperanto?"

Montriĝis el tiuj raportoj grandegaj diferencoj en la eblecoj instrui la lingvon en tiuj landoj. Ie oni ape-naŭ scias pri la ekzisto de Esperanto, aliloke, precipe en Hungario, Pollando, FR Germanio kaj Ĉinio, la cirkonstancoj estas pli favoraj. Mankas pli da informado pri la lingvo kaj pli celhavaj klopodoj en la instruado. Apartan atenton vekis raporto el Islando pri eksperimento uzi Esperanton en luda programo por instrui bazajn sociologiajn ideojn al 7- ĝis 8-jaraj infanoj.

Post tiuj raportoj la nova prezidanto de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI), prof. István Szerdahelyi, salutis en la nomo de la ligo, kies tuta estraro ĉeestis la Tagon, akcentante la neceson de

FONDAĴO GRABOWSKI

Premioj por 1985

En la kunsido de la Belartaj Konkursoj oni anoncis ankaŭ la ĉi-jarajn premiojn pro kulturaj meritoj el Fondaĵo Grabowski: Unua premio (750 usonaj dolaroj): **István Nemere** (Hungario) pro eksterordinara riĉigo de la Esperanta prozliteraturo per noveloj kaj romanoj dum la pasintaj jaroj; Dua premio (350 us. \$): **Christian Bertin** (Francio) pro riĉigo de la Esperanta fakliteraturo sur la terenoj de la komputiko kaj telekomuniko; Tria premio (150 us. \$): **Dante Bertolini** (Svislando) pro diskonigo de la Esperanta literaturo pere de tradukoj en la itala lingvo.

Krome, Fondaĵo Grabowski ĉi-jare subtenas per la sumo de 491,18 us. \$ la eldonejon **Ludovikito** (Japanio) pro la monumenta eldono de la "iam kompletigota" verkaro de Zamenhof kaj per 210,51 us. \$ la kulturrevuon **Fonto** (Brazilo), eldonatan de Gersi Bays kaj redaktatan de William Auld. La sumo de 140,34 us. \$ iras al Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj, 210,51 us. \$ iras al la Adopta Kaso de la UK, por ke homoj el netranspagipovaj landoj povu aliĝi. Dudek kvin procentoj de la ricevita jarrento aldoniĝos al la kapitalo de la fondaĵo.

intima kunlaboro inter ILEI kaj UEA pri instruaj aferoj.

Posttagmeze sekvis modellecioj pri poezio kaj geografio. Ragnarsson prezentis metodon kiel pritrakti Esperantajn poemojn en progresaj kursoj kaj analizis unu poemon, kiun la ĉeestantoj ricevis por legi kaj pritrakti. S-ino Tucker montris la uzadon de Esperanto en instruado de geografio, helpe de kelkaj gejunuloj.

La Tago finiĝis per ĝenerala diskutado sub gvido de s-ro Tucker, kiun partoprenis la publiko, pri diversaj aspektoj de la instruada situacio de la lingvo. Resumis la temtraktadon Baldur Ragnarsson, elmontrante la ĉefajn obstaklojn al la instruado de la lingvo: nescion de la publiko kaj de edukaj instancoj, malfavoron de lingvo-instruistoj, kiuj emas rigardi Esperanton kiel minacon al siaj profesioj, mankon de modernaj lernolibroj, mankon de kompetentaj Esperanto-instruistoj kaj kursgvidantoj, superplenajn instruprogramojn en la lernejoj, mankon de informado pri la jamaj praktikaj avantaĝoj, kiujn donas scio pri la Internacia Lingvo. La rimedoj por tion plibonigi estas unuavice pli celkonscia informado sur publika kaj instanca niveloj kaj faka preparado por tiuj, kiuj celas instrui la lingvon. Pri la dua rimedo okazis dumkongresa traktado inter la Eduka Komisiono de UEA kaj la estraro de ILEI, kiuj celas kunigi siajn fortojn por antaŭenigi programon por prepari Esperanto-kursgvidantojn.


JUNULARA PROGRAMO

Aktiva engaĝiĝo


La jam de kelkaj jaroj tradicia ebleco por malpli ol 26-jaraj gejunuloj senpage partopreni en la UK, se ili jam partoprenis en la IJK, estis uzita de pli ol 200 homoj, kiuj aktivis en la programo de la UK kaj en tiu, kiun oni aparte aranĝis por la gejunuloj, tiel ke la junulara partopreno en la UK estis samkvalita kiel tiu en la IJK mem.

Tute pozitiva estis la loĝado por la gejunuloj, kiu estis en lernejo, kies klasĉambrojn oni uzis kiel amasloĝejon, permesante tre malmultekoste sed tre konvene loĝi en la tuja apudeco de la kongresejo.

En la lernejo disvolviĝis parto de la junulara programo. Iom da miskomprenoj kun la surlokaj organizantoj malhelpis la efektivan partoprenon en ĉiuj partoj de la programo: tie, kie tiu konfliktis kun aliaj pro-



Partoprenantoj en la Junulara Forumo.



Norberto Saletti, estrarano de TEJO, prezentas la laboron de TEJO al kongresanoj.

grameroj; la translokigo de la Junulara Vespere al la lerneja parko teorie malpermesis ĉeesti la Balon, sed la bavara pluvo devigis karavanon de gejunuloj migri al la kongresejo, por iom kanti, danci kaj kune festi.

Mardon TEJO sin prezentis per ĝenerala priskribo de sia agado dum la pasinta jaro kaj de siaj planoj por la estonteco. Sekvis vigla debato pri "UK: kion ŝanĝi, kion konservi?"

Merkredon okazis tuttaga ekskurso al la nazia koncentrejo Dachau kaj al la urbo Munkeno. La unua parto estis unu el la kontribuoj de la junularo al "La Tago de la Paco", kiu sukcese premieris en la UK. Denove estis pruvita la emo de gejunuloj al la paco, kiu ne estas nur "Stato de nacio, popolo, tribo ks., kiu ne estas militanta kontraŭ alia." (*Plena ilustrita vortaro*, difino 1), sed, multe pli pozitive, laŭ difino 2, "Stato de anaro..., inter kies anoj ekzistas nenio malakordo nek malkonsento". (Oni tamen permesu al mi aldoni, ke eĉ ekzisto de nekonsento estas pace solvebla.) En la sama vespero okazis alia Junulara Vespere, kun bunta programo de kantoj kaj skeĉoj.

Imite al la akcepto por membroj de Societo Zamenhof, vendredon okazis akcepto por patronoj de TEJO, kiun ĉeestis dudeko de tiuj mecenatoj de la junularo. La dua vicprezidanto de TEJO, Martin Haase, skizis la agadon de la organizo, dankante la patronojn pro ilia tre grava helpo.

Dufoje kunsidis la Komisiono pri Internacia Junulara Jaro, komuna laborgrupo de TEJO kaj UEA. Kun kontento ĝi rimarkis, ke preskaŭ la tutan laborplanon oni plenumis, kaj la realigo de la cetera parto survojas. La komisiono planas pluaktivi en la sekvaj jaroj.

Eblas diri, ke Internacia Junulara Jaro vidis pozitivan partoprenon de la Esperanta junularo en la agado de la movado, kaj la du ĉefaj eventoj de la esperantista komunumo, la UK kaj la IJK, simile vidis aktivan partoprenon kaj engaĝiĝon de la gejunuloj.

Norberto Saletti

Unu kontentiga teatraĵo

Por multaj kongresanoj specialaj aranĝoj proponas agrablan paŭzon en la rondo de prelegoj kaj kunvenoj. Do la planantoj havas bonegan okazon atingi grandan spektantaron ne nur por amuzi ilin, sed ankaŭ por ilin pensigi. Ni rajtas, laŭ mia opinio, atendi ne nur altan kvaliton de prezento, sed ankaŭ taŭgan enhavon de la verkoj. Tiu ĉi ne estas ordinara teatra evento.

La unua prezentaĵo de Bulgara Esperanto-Teatro (BET), „La aŭsburga kretocirklo”, okazis en salono por 200 homoj, ne en teatro. Tiel terure varmegis en la salono, ke kiam oni alportis sur la scenejon glason da biero, la ĉeestantoj aplaudis. Sed la teatraĵo ege sukcesis, kaj ripetiĝis poste en la semajno.

„La aŭsburga kretocirklo” estas bazita sur rakonto de la aŭsburga verkisto Bertold Brecht, kaj temas pri ideo kiun li jarojn pli poste disvolvis en „La kaŭkaza kretocirklo”. Tiun ĉi mallongan version dramigis Werner Frisch, Brecht-esploranto kaj ankaŭ denaska aŭsburgano. Jomo Ipfelkofer tradukis ĝin en Esperanton. Frisch ĉeestis la prezenton, kaj tre favore komentis. Li aldonis, ke la urbo Aŭsburgo, en la festo de sia 2 000-jariĝo, ne prezentis la germanan version. Estis do duoble taŭge, ke la esperantistaro plenigu tiun mankon.

La dramo estas morala fabelo, en kiu du virinoj pretendas la saman infanon. Unu estas la korpa patrino, protestanta riĉulino, kiu forlasis la infanon, kiam ŝi forkuris de katolikaj soldatoj dum religia interbatalado en Aŭsburgo en 1634. La alia estas servistino, kiu savis la infanon kaj nun prizorgas lin. La teatraĵo havas la formon de proceso, en kiu konata juĝisto verdiktas inter la virinoj per la rimedo de la kreta cirklo: la servistino, kiu ne pretas vundi la infanon, perforte eltirante lin de la cirklo, estas juĝita taŭga patrino.

Tiu tezo, ke familiaj rilatoj dependas ne nur de sango, sed ankaŭ de agoj kaj kapablo, estas pensiga. Se temas pri kvalito de la prezentado, BET alportis al ĝi sian kutiman profesiecon. La iom baroka stilo de ludado favorata de tiu ĉi trupo bone funkciis en rilato al la simpla enscenigo, kie mankis ebleco de komplika lumado aŭ desegnarto. Kun la juĝisto, bonege prezentita de Ivan Zlatarev, meze de la scenejo, kaj la du partioj de mastrino kaj servistino ĉe la du flankoj, la dramo malvolviĝis sub kompleta atento de la spektantoj. Mi dividis kun la spektantaro ties entuziasmon: bone elektita dramo, bone prezentita.

Kvalito de prezento ankaŭ ne estis grava problemo en la formala Teatra Vespero, kie prezentiĝis „Tri viroj en la neĝo”, teatraĵo bazita sur rakonto de Erich

Kästner, sukcesa kaj multverka germana aŭtoro de la periodo inter la du mondmilitoj. Gertruda Lukanova, reĝisorino de BET, kaj la aktoro Teo Jurukov dramigis ĝin. „Tri viroj en la neĝo” estas farso de la fako „konfuzita identeco” kaj la subfako „ĉu la amo efektive floras”?

Mi tute ne komprenas, kial oni elektis tiun ĉi verkon por la ĉefa teatra prezentaĵo de UK. Sufiĉe bone aktorita kaj enscenigita, la dramo tamen ŝajnis al mi sen vera intereso. Granda laboro kaj kelkaj bonaj aktoraj prezentoj — precipe de Teo Jurukov kiel la riĉulo, kaj Belka Beleva kiel la sintruda estrino de hotelo — estis esence forĵetitaj. La UK prezentas certan defion en tio, ke necesas kaj amuzi kaj provoki la kongresanojn. „Tri viroj en la neĝo” malmulte provokis kaj ne sufiĉe amuzis.

Tute mala problemo evidentiĝis en la prezento de „La ludo de la paco”, verko de Bernard Benson. Tiu ĉi drameto, verkita por infanoj kaj plenkreskuloj, rekte defias kaj absurdigas la nocion de reciproka nuklea minaco. Infanoj, timante la eblecon de milito, konfrontas la prezidantojn de tri landoj kaj asekuras la estontecon de la planedo. La dramo allogas nin per sia simpleco kaj per la rekono, ke ni respondecas pri la heredaĵo de niaj infanoj. Optimisma kaj simpla, ĉi tiu estas bona teksto, tradukita de Jomo Ipfelkofer. Mi rekomendas ĝin kiel bonan ekzercon por grupo de lernantoj.

Prezentis „La ludon de la paco” trupo el Schwabmünchen. La infanoj en la trupo tre bone ludis siajn rolojn. Malfeliĉe, iuj el la plenkreskuloj estis malpli bone preparitaj. Ni pretas, mi kredas, pardoni neperfektan regon de la lingvo. Sed ŝajnas nepardonebla, ke por prezento en la UK la aktoroj simple ne parkeris siajn vortojn. Ĉar la teksto estis aĉetebla ekster la salono, la spektantoj troviĝis en iom kurioza situacio, nome ili konis la tekston pli bone ol la aktoroj. La deziro kriegi la ĝustajn frazojn al luktanta rakontisto estis foje apenaŭ bridebla. Post iom da tempo tiun



En la Solena Fermo Zhang Qicheng simbole transprenas la kongresan flagon unuafoje al Ĉinio.

senton anstataŭis deziro simple ĵeti kontraŭ lin la tutan libron.

Kion ni rajtas atendi, kiam temas pri Esperanta teatraĵo dum la UK? Mi argumentas, ke oni devas postuli kaj stimulan enhavon kaj certan profesiecon de prezentado. Malfeliĉe nur „La aŭgsburga kreto-cirklo” evidentigis tiun kombinon en la 70a UK.

Jane Edwards

ARTAJ ARANĜOJ

Jup' pli multe...

Nacia Vespero: La avida publiko inundis la ŝtupterasojn de la sporthalo por programo de muziko, danco kaj kanto. Popola kaj populara estis la kvodlibeto. Ĉiu (krom H. Rössler, deklamanto) portis bavaran/ŝvaban kostumon, jen kulotoj, jen ledaj ŝortoj; bluzo, jupo kaj antaŭtuko ĉe la virinoj. La fanfaro muĝis kun ronkado de kontrabaso, akordiona blago de la balgo; kvartetoj helvoĉe kantis, la gedancistoj kontradancis aŭ trotis procesie kun ritma vervo. La folklora instrumento "cimbalo" estis pli verŝajne zimbalo aŭ ksilofono. Ĉe la kantoj kaj deklamoj oni aŭdis lirikojn jam tradukitajn de Kalocsay: "Dornrozet" kaj "Elfreĝo" de Goethe, kaj "Sub la tilio" de Vogelweide, refaritajn kun domaĝo, ĉu pro nescio aŭ eble ĉar oni simple preferis hejman kuiron. Aparte bele ludis la gitaristo Otto Öllinger, kaj krakantaj vipoj donis plian folkloran tonon al la numeroj. Je la fino la publiko kunfluis kun la prezentantoj en libera dancado tra la salono.

Muzika Vespero: Ĉi tiu evento havis lokon en la majesta Salono Zamenhof kaj montris sin simpozio de kanto, kvazaŭ servo al la samtaga publika kantado sur la urboplaco. La apetito de la kongresanoj por melodia voĉado celis do al romia festeno, kaj ke ĉio estis laŭ gusto de la publiko atestis la lojala alŝvarmado kaj la tutkora aklamo, kiu leviĝis post ĉiu ero. Kaj prave. La tutan programon portis okopo da gekantistoj kaj pianistino Erika Becht. Nu la "ge-" dankindas al la du viroj: la baritona Ludwig Fluck, kiu sola aŭ duete rolis en kvar el la 12 numeroj, kaj la basa Veselin Damjanov. La multnaciaj fontoj de la pecoj, el operoj kaj popolkantoj, respondis – sed ne paralele – al la multnacieco de la talenta ensemblo. En la buntan girlandon plektiĝis floroj el aŭstra, germana, hungara, hispana, rumana, bulgara kaj rusa bedoj. Aparte ravis per sia virtuoza prezento kaj verva personeco Galja Kostova-Toteva, Jana Cikalova kaj Veselin Damjanov. Ĉio plej agrable regalis la inklinan kongresan publikon, kiu vivuis sian entuziasmon.

Internacia Arta Vespero: La dekjara Sara Su Jones kun deveno korea-irlanda, kiu lernis violonon laŭ Suzuki-metodo, tiris la animon el sia instrumento – kaj la koron el sia publiko – per la violon-konĉerto aminora de Viotti, kaj la biso, kiun postulis la ardaŭskultantoj. La ceteron de la duhora programo subtenis tri virtuozaĵoj plus Maria Durys kaj Marian Czarkowski, kabareta geduo, kiu kantis-aktoris kun bonega faklerto. La blonda kontraltulino Susanna Castel, sveda-angla knabino en pimpe nesimetria, parte aĵura tualetto kaj dande soldata kaskedo, kantis kaj gitaris, regante ĉiun efekton kun senĝena facilo por la sorĉita publiko. La soprano de Maria Angelova, pura kaj larĝgama, penetris patose ĉies bruston, kaj la hungara Anna Kiss turnis sian flekseblan talenton al eminenta interpreto de kanzonoj hungara, ĉina kaj tri usonaj. La tuton kronis ĥoro – dutrione virina – kiu sonore kaj solene fermis programon kortikle plezurdonan.

Ĉi tie, kiel en la merkreda vespero, rolis preskaŭ ekskluzive la virinoj, cetere senescepte belaj. Tiun superpezon mi ne plendas. Efektive jup' pli multe, des pli bone!

rr

Kaj plie okazis...

La pokalon Fayne ĉi-jare ricevis Unuiĝo Franca por Esperanto pro tio, ke ĝi dum la pasintaj kvin jaroj komplete renovigis sian instrumaterialon kaj la manierojn aranĝi kursojn, konstante lanĉis informkampanjojn kaj daŭre renovigis la uzatan informmaterialon laŭ la spertoj laŭgrade akiritaj. UFE ankaŭ funde reordigis kaj aŭtomatigis sian administradon kaj modele kunlaboris kun la centraj instancoj de la movado.

La Gazetara Servo dissendis dekojn da skribaj raportoj por la amaskomunikiloj. Al la du gazetaraj konferencoj venis respektive sep kaj tri raportistoj. Tri aliaj sekvis la programon de la UK. Dudek ĵurnalistoj telefone petis informojn. La kongreson atentis ses enlande aŭskulteblaj radiostacioj kaj la eksterlanda servo Deutsche Welle, kiu produktis 30-minutan programon, satelite elsendotan al 480 stacioj tra la mondo.

Honoroj: La Komitato elektis s-ron Harry Harrison membro de la Honora Patrona Komitato. D-rino Marjorie Boulton kaj s-ro Li Haipin estis elektitaj Honoraj Membroj de UEA. En la oktobra numero de *Esperanto*, aperos biografioj pri la tri honoritoj.

En la speciala **kongreseja poŝtoŝtanco** brave laboris du poŝtoŝtancistoj, kiuj bone lernis sufiĉe da Esperanto por la okazo kaj specialstampis ĉiun el la plurmiloj da bildkartoj kaj leteroj.

La kongresa libroservo certe estis la plej ampleksa de multaj jaroj. Entute kvar kubaj metroj da libroj

veturis el Roterdamo al Aŭgsburgo kaj, kune kun pliaj alportitaj de aliaj lokoj, temis pri ĉirkaŭ mil diversaj titoloj, kiuj plenigis la grandan kaj tre taŭge nomitan Salonon Friis. Dum la tuta kongresa semajno pluraj volontuloj laboris en la libroservo, kiu enspezis pli ol 60 000 guldenojn.

De la **kongresa kuriero**, *La strobilo* (nomita laŭ la urba blazono), aperis entute ses bone presitaj numeroj en granda formato. Ĝin redaktis Stefan Maul, Thomas Bormann kaj Paul Peeraerts, kiuj ricevis laŭdojn pro la akurata aperigo de la kongresaj kaj ankaŭ mondaj novaĵoj.

Fervojoj kaj fervojistoj: Germana Federacia Fervojo (DB) instalas laŭ peto de LKK gravan informtandon, kie dum la tuta semajno tri membroj de Germana Esperanta Fervojista Asocio servis al kongresanoj. Komence ĝi vendis favorprezan semajnbileton de la urba trafiko, poste amasiĝis demandoj pri vojaĝeblecoj. Fervojan bileton oni povis ricevi en la tago post la mendo. En la ekskursita tago 67 fervojistoj el 17 landoj renkontiĝis por aŭskulti raporton pri la 37a kongreso de Internacia Fervojista Esperanto-Federacio kaj rigardi lumbildojn pri la ekspozicio "150 jaroj de la fervojoj en Germanio" en Nurenbergo, kiun ili poste vizitis.

Internacia Ekzameno: Post unujara paŭzo la duan fojon okazis la Internaciaj Ekzamenoj. Du personoj sukcese trapasis la elementan ekzamenon, dum 14 personoj akiris la mezgradan diplomon.

Statistike: Tiuj, kiuj ŝatas statistikojn, povas noti, ke la Loĝiga Servo peris 1 537 tranoktejojn, dum la Ekskursita Servo vendis 1 800 biletojn.

Denove gvidis la jam tradician **aŭkcion** Humphrey Tonkin kun sia kutima eltrovemo. Ĉirkaŭ 300 homoj en la preskaŭ plena Salono Grabowski ĉeestis.

Tonkin malfermis la aŭkcion, dirante ke ne temas pri "publika spektaklo", sed pri "serioza celo". Li aldonis, ke la tempo sufiĉos por dediĉi nur po 20 sekundojn al ĉiu aŭkcienda objekto! Temis ĉefe pri libroj, sed troviĝis i.a. ankaŭ pluraj filatelaĵoj kaj modelo de la samovaro de Tolstoj! Kolektantoj kaptis la okazon akiri plurajn valorajn, ne plu haveblajn eldonaĵojn. Espereble venos por venontaj aŭkcioj pli da diversspecaj varoj.

La plej elstara objekto tamen estis tute nova ekzemplero de *Esperanta antologio*. Ĝia elstareco ŝuldiĝis al tio, ke aŭtografis ĝin preskaŭ dudeko da ĉeestantaj poetoj, kies verkoj aperas en ĝi. La libro atingis la aŭkcian prezon de 160 germanaj markoj: verŝajne bona investo por la aĉetinto. Alia bona vendo/aĉeto estis la (maldika) protokolo de la unua Universala Kongreso de Bulonjo-sur-Mar. Por ĝi pagiĝis pli ol cent markoj.

La aŭkcio ĉi-jare portis al la ĝenerala kaso de UEA la kontentigan sumon de ĉ. 2 300 germanaj markoj.

Infanoj kaj cindrulino

Dum la plenkreskuloj kongresis apud la centro de Aŭgsburgo, 44 infanoj, helpantoj kaj gvidantoj kunvenis en trankvila loko en antaŭurbo. El la kvin Internaciaj Infanaj Kongresetoj (IIK) kiujn mi ĉeestis, ĉi tiu profitis de la plej taŭga ejo: estis bonaj dormĉambroj, larĝaj koridoroj kie la infanoj povis kuri sendanĝere (nepra avantaĝo je mardo, kiam senĉese pluvis), bela naĝejo kaj multaj ĉambroj por ludi, labori, danci kaj kanti. Koncerne la ejon, nur la manĝoj estis nelaŭdindaj: mankis legomoj kaj fruktoj, kaj la vianĉaĵoj ofte sin prezentis tro germane por eksterlandaj infanoj.



Ekster la inaŭgurejo la infanoj atendadas la bonvolon de la plenkreskuloj.

Se la programo sukcesis, tio estis malgraŭ kaj ne pro UEA, por kiu la IIK delonge estas la cindrulino de kongresaj aranĝoj. Nur kiam la Estraro nomos konstantan gvidanton aŭ, eĉ pli utile, starigos komisionon pri infanaj aferoj, nur tiam oni evitos la samajn erarojn jaron post jaro, kun, ĉi-jare, la aldona eraro en formo de deklama konkurso.

Tamen, infanoj estas malpli kritikemaj (krom pri manĝaĵoj!) ol plenkreskuloj, kaj ŝajne tre ĝuis la semajnon. Ili venis el 13 landoj, kaj en la fino nur unu (kaj tiu, premigajninto!) ne kapablis babili Esperante. Je dimanĉo, la plej notinda afero, infanvidpunkte, estis la longa atendado antaŭ la unu-minuta sinprezento en la Inaŭguro; kaj ĉu nur por kontentigi la sentimentalecon de la UK-anoj? Postaj ludoj, dancado kaj kantado estis por la geknaboj pli agrablaj. London matene ili partoprenis ĉe la UK en "La ludo de la paco", meritplena sed mallongigenda teatraĵo, longan posttagmezan restadon ĉe la naĝejo en bela vetero ili plene meritis.

Sekvis pluvega mardo, kiu ne permesis planitan viziton al la bestĝardeno (kvankam foje aŭdeblis

francaj krokodilinoj); feliĉe, gvidantinoj Irene kaj Marie instruis tre plaĉajn dancojn, Helga kaj Kazue manlaboris, diversaj surloka ludiloj bone distris, kaj la infanoj jam sufiĉe bone konis unu la alian por sin amuzi babilante; vespere, memore al Hiroŝima Tago, Kazue prezentis bildrakonton pri japana paclaboro. Merkredon matene la geknaboj ĝuis viziton de indiano, kaj multe ŝargis lin per demandoj; posttagmeze la vetero permesis la viziton al la bestĝardeno, kie infanoj fotis bestojn, gvidantoj fotis infanojn, kaj pribesta bildvortareto de nia ĉefino Irene helpis konversaciojn.

Ĵaŭdon la infanoj vizitis la malnovan urbon, preparis sin por morgaŭaj skeĉoj kaj konkurso, kaj vespere ĝuis lumbildojn pri antaŭaj infankongresoj. Venis vendredo, kies suno iom forpuŝis la ombron ĵetitan de la kongresfino, kaj permesis lastan banadon, post pupteatraĵo. Pri la konkurso aranĝita de Fondaĵo Grabowski, la juĝantoj (Benczik, Kikusima kaj Nourmont) ne aljuĝis unuan premion, kaj la duan kaj trian donis al la, laŭ mi, plej plaĉaj eroj, rakonteto de Daniel Grossmann kaj kanto de Petro Schaeffer. Se tamen la celo de la malavaraĵ premioj estis kuraĝigi la seriozan uzadon de Esperanto, ĝi ja povis maltrafi, ĉar infanoj havas fortan kapablon parkerigi sen kompreni la vortojn. Plue, niaj gvidantoj unuanime konsideris nenecesas konkursigon de infanoj tute kontraŭ la spirito de Zamenhof. Feliĉe, donacoj al la kaso "Adoptaj Gepatroj" ebligis disdonadon de belaj libroj al ĉiuj partoprenantoj, por ke neniuj infano fine malkontentiĝu. Mi tamen proponas al Fondaĵo Grabowski pli altvalorajn metodojn por forigi la "cindru-linecon" de niaj Infanaj Kongresetoj.

Christopher Fettes

41a INTERNACIA JUNULARA KONGRESO

Junulara jarfesto vigletosa kaj varienhava

Estas malfacile verki raporton pri IJK aŭ simile, tiel ke oni sukcesas menciigi ĉiujn indaĵojn. Tiu problemo estas des pli granda rilate la ĉi-jaran IJK, kies programo estis aparte bunta kaj ampleksa.

Regate, do, de spacolimo kaj propraj gustoj, ni prezentas pli-malpli arbitre elektitan aron da rakonteroj, kiuj almenaŭ por ni plej elstaras en la memoro.

La ĉi-jara IJK okazis de la 22a ĝis la 29a de julio en Eringerfeld, vilaĝeto en FR Germanio. Partoprenis 420 gejunuloj el 32 landoj de kvin kontinentoj. La kongresejo absolute taŭgis, estante granda loĝlernejo. Ĝi havis do ĉion, kion kongresanoj povus

bezoni en unu loko: loĝĉambrojn, manĝejon, grandan kunvenhalon, naĝejon, abundajn klasĉambrojn por pli malgrandaj diskutrondoj, laborgrupoj kaj simile – sed ofte pli agrablis sidi ekstere sur herbejo por tiuj celoj, ol forŝlosi sin en ĉambro.

La kongresa temo estis "Junularo inter Revo, Ribelo kaj Rezignacio". Tiuj tri ecoj ŝajnas bone difini la aktualan junularon, do ankaŭ la esperant-

Foto: Amri Wandel



Viroj de la TEJO-estraro: Saletti, Haase, Parzyszek, Jackson, Humet kaj Koszmaluk (vd. p.158)

istan. Tiu ĉi IJK ŝajnis al ni aparte junulara, pro tio ke la partoprenantoj esprimis sian junulecon pere de Esperanto, anstataŭ esti junaj versioj de ia stranga besto, kiu nomiĝas esperantisto. Tio kulminis en la Muzika Vespere, kiam okazis vere Esperanta rokmuzika koncerto. Tio konsistis el du ensembloj, nome la ĉiam pli konata "Amplifiki" el Skandinavio kaj la relative novaperinta "La mondanoj" el okcidenta Berlino. La kvalito de la muziko sen ajna dubo egalas al internaciaj rokmuzikaj normoj – eĉ superis ilin – kaj la etoso inter la aŭskultantaro estis absolute junulara kaj aŭtentike rokkoncerta. Tian ĉi evoluon en nia Esperanto-kulturo ni elkore bonvenigas kaj forte aprobas. Ni tamen ne tute preteratentu nian esperantistecon, kio estu io vere speciala kaj nepre evoluinta. Ni zorgu ne tro popoldanci, manlabori kaj naĝi, ĉar tiaj aferoj nur pormomente plezurigas kaj apenaŭ havas ajnan pli gravan sekvon ĉu por onia propra esperantisteco, ĉu por la evoluigo de la lingvo kaj ties movado ĝenerale. Kiel ĉiam en ĉiuj vivosferoj, necesas trovi ian ekvilibron por ne doni damaĝan prioritaton al nur certaj aferoj. Mankis, ekzemple, interlingvistika seminarieto en la IJK-programo.

Rilate seriozaĵojn, ni menciigu la diligentan laboron de la komitato. Ĝi aprobis novan TEJO-Regularon, kiu en unu dokumento ampleksas la enhavon de pluraj antaŭaj regularoj, interkonsentoj kaj simile, kiujn ĝi efektive anstataŭas. Ĝi estas do signifa paŝo al pliefikigo de TEJO. Krome, elektiĝis nova estraro kaj restariĝis pluraj komisionoj, inkluzive novan pri la Jubilea Jaro, kiu jam havas interesan laborplanon.

La plej intensa grupo traktis la kongresan temon ne filozofie, sed persone. Tyburcjusz Tyblewski gvidis

grupon kun la titolo "De la revoj ĝis memrealiĝo", kiu intime kaj profunde esploris la rilatojn de la homo kun si mem kaj kun la proksimuloj. La grupo laboris dum pli ol kvar horoj en tri sinsekvaj tagoj. Ni kunvenis en salono de la kastelo kaj, tiel ŝirmitaj, ni komencis demeti kelkajn el niaj kutimaj maskoj kaj roloj. Kvietaj meditado montris kiom malmulte ni kutime atentis. Blinda promenado, gvidata de alia, montris novajn ecojn de kaj la ekstera kaj la interna mondoj. Per tiaj ekzercoj kaj posta diskutado, ni komprenis pli pri ni kaj pri niaj kunuloj.

La Nacia Vespero estas tradicia parto de IJK, same kiel UK. Martin Haase sprite gvidis la programon tra germanaj popoldancoj, kantoj el diversaj jarcentoj kaj propra traduko el la germana literaturo. La ĉeestantaro laŭdis ĉiun eron per daŭra aplaŭdo, kiu foje minacis malpermesi la foriron de la prezentintoj.

La dancado mem estis sufiĉe internacia. Estis germana versio de franca danco, kies nomo signifas "poleca". Aŭ eble estis pola danco kun franca nomo. Temis pri pompa promenado laŭ la randoj de la ĉambro, pare, kvarope, okope kun- kaj disiĝante en ĉenojn, en arkojn kaj en cirklojn, ĉiam kun la vigla polka muziko. Estas emociige danci kun 250 homoj, des pli kiam ili dancas bone. Post eble 20 minutoj, ni atingis la kulminon, kiam paroj da paroj pariĝadis en vicojn tridekduopajn, kaj tramarŝis la salonon kun

bruo, kiu timigus malgrandan armeon. La muziko finiĝis, kaj krioj atestis la grandan ĝuon de ĉiuj.

Tiu laŭplane estus la fino, sed la ĉeestantoj ne permesis. Pro ilia insistado, baldaŭ komenciĝis "Doudlebska" polko, ludeca danco kun paroŝanĝo. En la centro de la cirklo staris la kompatinda muzikisto, mezaĝa, mezalta, mezdika, bavare vestita germano, kiu komencis sian duan horon da ludado. Subite, iu, kun dua akordiono, ŝovis sin en la cirklojn kaj kun timeta rideto, ekludis. Li estis juna, dinamika dano, preskaŭ du metrojn alta. Liaj ŝuoj estis flame ruĝaj. Liaj haroj simile, kun aldono de verdo kaj oro. Diversaj orelingoj, nigra senmanika ĉemizo kaj hermetika pantolono kompletigis aspekton iom for de tradicio. La ŝokita mieno de la unua muzikisto aldonis al la plezuro de la dancantoj, kiuj rekonis la duan, Kim Henriksen, membron de la muzikgrupo "Amplifiki". Ili bone kunludis, sed eble pro tiu ŝoko ankaŭ la melodio iom maltradicieiĝis.

Rajdi 500 kilometrojn tra pluvon, trans montetojn, per pezaj, ofte malnovaj bicikloj ne allogas ĉiun. Sed 38 gejunuloj aliĝis al la bicikla karavano de la IJK al la UK, kaj multe ĝuis la sperton. La etoso estis gaja kaj intima, kaj ofte preskaŭ senzorga. Ni pasigis la unuan nokton en ludejo herbokovrita, laŭ invito de la vilaĝestro. Matene, mirinde afabla najbaro invitis nin ĉiujn lavi nin en lia domo. La duan nokton ni restis kun eltenema esperantista familio, kiu eĉ invitis nin reveni.

La sekva tago banis nin, malgraŭ la fakto, ke ni ĉiuj jam duŝiĝis en la domo. Posttagmeze en pluva Miltenburg, la ideo de malseka tendo allogis multe malpli ol la propono de loka esperantisto, kiu aranĝis, ke ni restu en la urbodomo. Tiu konstruaĵo menciigis en skribaĵo el la jaro 1327 – aŭ simile. Tie ni dormis trankvile, kio pravas, ke juneco kaj maljuneco povas pace kunvivi.

Sekvis tago tre longa kaj alia tre suna. La grupo atingis Aŭgsburgon kun doloraj muskoloj kaj ruĝa haŭto. Tra ĉio la granda ĝuo estis la kuneco. Ĉiam haveblis interesa diskuto aŭ amuza konversacio. Estis tempo por amuziĝi kaj amikiĝi. Partoprenantoj el tri kontinentoj pretas diri: "Ja, mi volas karavani refoje".

La 41a IJK estis aparte vigletosa kaj diversenhava por kontentigi ĉiujn. Por homoj, kiuj ŝatas listojn, jen listo de iom el la programeroj: bazaro kun pli ol 15 specoj de manlaboro, vinvespero, ĥoro, pluraj sporteblecoj, teatra vespero, diskoteko, diservo, ekskursetoj, biciklado, Internacia Vespero preskaŭ kvinhora, popoldancado, diskutrondoj diverstemaj, lud-festo i.a. kun enorma aerkuseno, sur kiu povis rampi, salti kaj ruliĝi dekoj da homoj, libroservo... kaj kompreneble abunda tempo por tutsimple esperantisti kaj kunestegi internacian geamikaron.

Graham Cansdale kaj Derek Roff

Nova Estraro de TEJO (1985-1987)

Prezidanto (Jubilea Jaro): Ian Jackson, p/a Coward Chance, 2505 Edinburgh Tower, The Landmark, 15 Queen's Road Central, Honkongo.

Ĝenerala sekretario: Jan Koszmaluk, Chłopickiego 49C/2, PL-04-275 Warszawa, Pollando.

Kasisto: (rilatoj kun aliaj UEA-organoj): Alex Huet, Terliststraat 12, B-2018 Antwerpen, Belgio.

Unua vicprezidanto (landa agado): S-ino Marie Vančurová, Palackého 153, CS-289 03 Městec Králové, Ĉeĥoslovakio.

Dua vicprezidanto (kongresoj): Martin Haase, Kiebitzweg 9, D-4600 Dortmund, FR Germanio.

Estrarano (aktivula trejnado, membraro): Jarosław Parzyszek, Nowe Kawkowo 25, PL-11-043 Wołowo, Pollando.

Estrarano (kultura kaj faka agadoj): Norberto Saletti, Via Libia 20/4-1, I-40138 Bologna, Italio.

Estrarano (eksteraj rilatoj): S-ino Elisabeth Schwarzer, Kopischstr. 3, D-1000 Berlin 61, FR Germanio.

Kelkaj opinioj pri la UK

F-ino Florina Caragea (16-jara) el FR Germanio: Ĉi tiu estas mia dua UK. Mi partoprenis tiun de 1983 en Budapeŝto. Mi trovas la nunan kongreson parte interesa kaj parte neinteresa. Al mi plaĉis la Junulara Vespero kaj la teatraĵoj *La tri viroj en neĝo* kaj *La aŭgsburga kretocirklo*. Mi ĉeestis ankaŭ la kunsidon de Esperantista Verkista Asocio, kiun mi trovis interesa, sed ne plaĉis al mi la Pacludo, ĉar oni prezentis ĝin pere de komencantoj, kiuj tute ne regis la lingvon. Ili ne kapablis eĉ legi de iu papero.

S-ino Willemien Dorleijn el Nederlando: Ĉi tio estas mia unua UK, do mi ne povas kompari kun aliaj. Mankas programero por vere renkonti homojn. Oni kompreneble povas alparoli iun ajn, sed devus troviĝi programeroj por manlaboro aŭ simile. Estas agrabla etoso. Helpas la bona vetero, kaj mi povis ja renkonti homojn, kiujn mi jam konas. Vere plaĉis al mi la kunsido de Oomoto. Mi partoprenis la Konversacian Rondon, sed la gvidanto ne sufiĉe regas la lingvon por gvidi kurson; mi tamen restis, ĉar tie estis iranano, kiu iom klarigis pri la persa lingvo, kaj tion mi ŝatis.



Paride Marson el Italio: Ĉi tio estas mia dua UK, ĉar mi estis en Antverpeno. Mi pensas, ke en Antverpeno estis pli facile sekvi pli ol unu aferon. La aranĝo de la ĉambroj estis pli bona, kiel ankaŭ la ĝenerala organizo, sed ĉi tie tamen estas sufiĉe bone. Plej interesas min la bonaj parolantoj, sed ne estis tre multaj. Iuj tamen estas vere tre bonaj, ekzemple Auld, Tonkin kaj iuj aliaj, kies nomojn mi ne memoras. Ne multe plaĉis al mi la Junulara Vespero. La aranĝita ludo estis iom tro infaneca, sed mi bone taksas la klopodojn, kiujn ili faris por ĝi. Oni devas ankoraŭ pli atenti ne samtempe okazigi similtajn programecojn, sed mi komprenas, ke tio estos malfacila tasko. Kaj, en ĉi tiu kongreso okazis tro multe da programŝanĝoj. Oni iras ekzemple en la urbon, kaj reveninte, oni trovas, ke okazis ŝanĝo, tiel ke oni maltrafis ion.

Angelos Tsirimokos el Greklando, loĝanta en Belgio: Mi partoprenis jam kvar Universalajn Kon-

gresojn. Pri ĉi tiu mi havas ĝenerale bonan impreson. La ĝiĉetoj ŝajnas al mi bonege organizitaj. Plej impresis min la fakto, ke kvankam mi ne jam mendis loĝejon, ĉar mi malfrue decidis veni, tamen kiam mi alvenis ĉi tien, oni rapide trovis por mi hotelĉambron en la kategorio, kiun mi deziris.

Mi havas unu teknikan kritikon. Eble oni ne antaŭvidis la popularecon de kelkaj aranĝoj. Ekzemple tiun pri la Belartaj Konkursoj oni metis en la Salono Zamenhof, kvankam ĉeestis nur trideko da personoj, sed tre popularajn teatraĵojn oni metis en la ĉambron Grabowski, en kiun ne ĉiu povis iri. Nun estas filmoj, kiujn mi ŝatus spekti, sed oni montras ilin en la Salono Ziegler, kiu estas plenplena.

Aparte plaĉis al mi la Esperantologia Konferenco, almenaŭ kvin sesonoj de ĝi. Mi devas konfesi, ke mi zorge evitis la solenajn kunvenojn. Mi bedaŭras, ke mankas la kvizo.

S-ino Jacqueline Nagey el Usono: Mi tre ŝatas la kongreson. Mi partoprenis la pasintan jaron en Vankuvero, sed tiam mi ne tre ŝatis la kongreson, ĉar mi ne povis bone paroli kaj kompreni. Mi certe ankoraŭ ne estas sperta, sed mi povas paroli kaj kompreni kaj mi ŝatas la etoson, aparte tion, ke estas pli da gejunuloj. Mi tre ŝatis la Junularan Forumon, ankaŭ la vesperajn programerojn. Se doni sugeston, eble en la Kongresan Libron oni devus meti pli pri diversaj grupoj, ekzemple TEJO ne estis enlistigita. Ne jam ĉiu ricevas la Jarlibron.

S-ino Eva Bork el FR Germanio: Kolektiĝas ĉi tie multegaj grupoj, kaj tio fakte estas la celo. Mi venis interalie por renkonti multajn geamikojn. Mi partoprenis en la kunveno de la go-ludantoj. Mi havis ĝis hodiaŭ nenian ideon pri goo. Ili tre bone montris kaj klarigis la ludon. Ankaŭ en la kunveno de Oomoto oni klare prezentis.

Mi nur bedaŭras, ke mia hotelo troviĝas tro for de la kongresejo, tiel oni perdas tempon. Mi ne multe uzis la kongresajn servojn. Mi pensas, ke ili ne estas optimumaj, sed oni devas konsideri, ke amatoroj faras ĉion, kaj tion oni devas admiri, eĉ se ne ĉio iras glate.

Kongresanino el Irano: Mi estas nun la unuan fojon en Universala Kongreso. Mi trovas ĝin tre interesa, ĉar mi renkontas multajn esperantistojn el diversaj landoj.

Ni atingis Aŭgsburgon du tagojn antaŭ la kongreso kaj volis serĉi lokon por ripozi. Ni telefonis al la Loka Kongresa Komitato, sed iu respondis, ke ili ne havas tempon. Poste mi serĉis hotelon, sed ĉar ni havas devizajn problemojn, estis por ni ege multekoste. Bonŝance ni renkontis irananon, kiu helpis nin. Mi frue ensendis mian aliĝilon, sed povis pagi nur surloke.

Ĝenerale mi povas diri, ke la vesperaj aranĝoj estis bonaj. Mi estis ankaŭ en la Konversacia Rondo. Mi

ne scias kial, sed la instruisto nur ludis per kartoĵoj ktp. kaj demandis min pri mia situacio, al kio mi ne volis respondi. Mi partoprenis en multaj kunsidoj. Plaĉis al mi multaj programoj, sed ne ĉiuj. Preskaŭ ĉiuj prezidantoj kaj parolantoj parolis pri eŭropaj malfacilaĵoj, ne pri Azio, Afriko ks. eĉ rilate al literaturo. Ili forgesas, ke estas esperantistoj en aliaj landoj, en la tria mondo ktp. Ni en Irano multe laboras en neorganizita formo, kaj multaj dediĉas sian tutan tempon al la Esperanto-movado, sed oni emas forgesi tion.

Kongreseroj...

★ **Restoracia ŝvito:** Ke la konduto de pluraj kongresanoj ne ĉiam estis ĝusta, atestis protesto de ŝvitanta servistino en la kongresa restoracio: "Kial tiuj homoj tiel agas? Ili sidas kelkajn minutojn kaj poste tuj postulas pagi. Kio estas pri ili?" Ŝi ricevis la respondon: "Mi ne scias".

★ **Sekreta surprizo:** En la kongresa kuriero oni anoncis surpriz-donaĉon de la urbo, kiu malkovriĝos dum la balo. Oni atendis kaj atendis kaj ĉe la fino sci-volante demandis pri tiu surprizo. "Ho, tio jam okazis", iu respondis. "En apuda ĉambro junulinoj paradis en vestaĵoj, montrantaj la dumiljaran historion de Aŭgsburgo". Neniu pensis anonci la okazaĵon, tiel ke ege malmultaj kongresanoj spektis "la sekretan surprizon".

★ **Bala interrompo:** La balon bonhumore interrompis aro da gejunuloj, kiuj manifestacie invadis la dancplankon. Nu, se temis pri manifestacio, verŝajne neniu sukcesis kompreni, pri kio temas. Post deko da minutoj ili foriris krokodilvoste inter la tablojn.

★ **Irana pirata represo** de *Plena ilustrita vortaro* vidiĝis en la kongreso, verŝajne la unuan fojon en Eŭropo. Oni ja ne vendis ĝin en la kongresa libro-servo, sed ĝi estis aĉetebla en la apuda parko!



★ **Burkina ekssoldato:** Sendube pluraj aŭskultantoj havis miksajn sentojn, kiam je la miro de multaj la Konsulo de Burkina Faso salutis la kongreson i.a. ankaŭ kiel la prezidanto de la ekssoldata ligo de Bavario.

★ **Ĉu nova prezidanto?** En aparta akcepto okaze de la Aŭgsburga Pacfestoj, urba oficialulo salutis "La prezidanton de Universala Esperanto-Asocio, la bel-



gon... Diccon Masterman". Malkomfortis tie ne nur la prezidanto Maertens sed ankaŭ la kongresa sekretario Masterman, kiu eventuale povus imagi sian prezidantiĝon en UEA, sed neniel konsiderus fariĝi belgo.

★ **La Estraro kantas:** La oficeja ĉambro asignita al la Estraro de UEA enhavis fortepianon. Ĉar tio estis la sola instrumento en la kongresejo, baldaŭ svarmis tie gekantistoj (precipe bulgaraj) por provludi. Kvan-kam la Estraro fuĝis de tie, multaj kongresanoj miris pri „la belaj kantvoĉoj de la estraranoj” malantaŭ la fermita pordo, kiu ankoraŭ portis la surskribon "Estraro de UEA".

★ **Liberaeraj kunsidoj:** Kelkajn horojn antaŭ la unuaj komisionaj kunsidoj oni malkovris, ke la koncernaj ĉambroj estis meblitaj de duetaĝaj litoj! Provoj improvizi aliajn kunsidejojn en la kelo malsukcesis, tiel ke pluraj komisionoj preferis kunsidi sur la herbejo en la korto.

★ **UN-flago:** Omaĝe al la 40a datreveno de Unuiĝintaj Nacioj, antaŭ la aŭgsburga kongresejo flirtis dum la tuta semajno ankaŭ la flago de la monda interŝtata organizaĵo. Necesis venki amason da malfacilaĵoj por havigi la flagon, pri kiu disponis nek la urbo nek la registaro en Bonn, sed helpis iu centra germana flagejo en Hamburgo.

★ **Por fieri kaj inverse:** "Esperanto estas preskaŭ cent jarojn aĝa – esperantistoj simile." Tiun deklaron faris la kongresa sekretario Masterman tuj post la kongreso en Aŭgsburgo, kie tamen ĉeestis kelkcento da gejunuloj. KKS eventuale ne rimarkis ilin pro la fakto, ke plimulto povis aliĝi senpage pro sia partopreno en la TEJO-kongreso.

Anoncoetoj

Studi matene, ferii posttagmeze, jen la kursformulo de la Internacia FERIA Altlernejo de Kultura Centro Esperantista, CH-2301 La Chaux-de-Fonds (Svislando). Petu informilon!

Industri-Komerca Federacio de Shaanxi kun esperantistoj tutmonde pri ekonomio, komerco kaj informado. Skribu al: Dongmutoushi Lu 11, Xi'an, Shaanxi, PR Ĉinio.

Por ekspozicio dokumentojn el la tuta mondo deziras f-ino R. Correy, 10 rue des Courtils, F-25000 Besançon. Koran antaŭdankon.

Mi skribis teorion pri la fizikaj fundamentoj de la konscio en la germana lingvo. La karaktero estas dialektike-idealisma. Entute 90-paĝa. Mi serĉas gesamideanojn, kiuj volas traduki ĝin en aliajn lingvojn, ankaŭ en la lingvon Esperanto. Mi serĉas ankaŭ eldonejon, kiu volas helpi ĉe la disvastigado. Adreso: S-ro Rudolf Jax, Linzer Bundesstr. 67C, A-5023 Salzburg, Aŭstrio.

URĜA ALVOKO: La sola espero rilate la solvon de la mondvastaj problemoj estas la reveno al la bibliaj instruoj. Por ricevi senpagan libreton kun fascinaj detaloj, skribu tuj al: **Internacia Biblio-Misio, 29 Plantation Road, Poole, Britujo BH 17 7LN** aŭ, se ekster Eŭropo al: **P.O. Box 373, Baronia, 3155 Vic., Aŭstralio.**

L'Espéranto dans l'enseignement: d-ro Pol Denoël. 30p. 23cm. Informbroŝuro pri Esperanto kaj ĝia instruado. Prezo: 100 B.fr.

Initiation théorique et pratique: d-ro Pol Denoël. 96p. Ilus. 22cm. Gramatika lernolibro kun bonaj klarigoj, plej taŭga por publikaj kursoj. Prezo: 250 B.fr.; kaseto: 150 B.fr.; **Corrigé des exercices:** 80 B.fr.

Aerpoŝtaj leterpapero kaj kovertoj: kun surprisitaĵoj kaj la vorto *Esperanto*. Pakaĵoj de 50 folioj aŭ 50 kovertoj. Prezo: 145 B.fr.

Gluafiŝo: Internacia Lingvo Esperanto: kun homa figuro kaj verda stelo. 7 × 17 cm. Prezo: 25 B.fr.

Novjaraj gratulkartoj: kvar diverskoloraj kartoj (kun kovertoj) en kvin lingvoj: Esperanto, la franca, nederlanda, angla kaj germana. Prezo: 60 B.fr.

Gluetikedo "Esperanto 1887-1987": Orkolore presita. Uzeblaj sur korespondaĵoj ktp. Prezo de koverto kun 100 gluetikedoj (minimuma mendokvanto): 100 B.fr. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas sendokostoj.

Last' aperis: Dumonata. Informilo pri novaj libroj, kasedoj ktp. Do, kiam vi deziras scii, kio aperis en la libromarkato, bv. tiam aboni al *Last' aperis*. En ĉiu numero vi trovos *Vestfaliaj flugfolioj* de Rikardo Ŝulco. Kun recenzoj pri esperantaĵoj. La abonprezo estas 15 gld. Ĉiuj tutnovaj devizaj abonantoj, kiuj nun pagas al la konto "snrl-v" por 1986 (tiu oferto validas nur ĝis 31 dec. '85) ricevos senpage la lastajn ĉi-jarajn numerojn, ekde la momento de abono ĝis la fino de 1985 (ĝis eventuala elĉerpiĝo). Bv. pagi al nia UEA-konto "snrl-v" kaj sendi la duan folion de la ĝirilo al Eldonejo & Librejo **SONORILO**, Doornstraat 22, B-2610 Wilrijk Belgio.

**FIDEL
CASTRO**

**La historio
absolvos min**

La unua Esperanta libro el Kubo. Ĉefverko pri kuba historio. Fama parolado, farita en la proceso Moncada kaj fariĝinta programo de la kuba revolucio.

El la hispana tradukis Kuba Esperanto-Asocio. Havano: Eldonejo José Martí, 1984. 62p. 21cm. Prezo: 4,20 gld. ĉe la Libroservo de UEA. Triona rabato por samtempa mendo de 3 ekzempleroj.

Emistudio estas kanada Esperanto-kooperativo kies kunlaborantoj estas membroj de la familio du Temple

EMISTUDIO

Nova Produkto: Emistudio anoncas la UNUAN KASETON DE VESELIN DAMJANOV:
TITOLO: VESELIN DAMJANOV KONCERTAS EN KANADO.

La kaseto prezentas operajn ariojn, popolkantojn, kaj kanzonojn ne troveblajn ĉe diskoj. Profesie registrita en teknike plej moderna studio kun kolora bildo de la kantisto, la kaseto havas falditan enfermaĵon kun tekstoj de la Esperantaj kantoj. La kaseto estas unika donaco por neesperantistoj, ĉar ĝi prezentas kantojn ankaŭ en la lingvoj franca, itala, rusa, angla kaj bulgara. Eminent donaco por amiko, ĝuinda kaj melodia aŭskultado por vi de la plej fama kaj riĉa baritona voĉo en Esperantujo. Subtila pruvo al la ĝenerala publiko pri la beleco de Esperanto. Mendu ĉe Emistudio por \$11,00 kan., aŭ ĉe UEA por 31,80 gld.



BUKEDO DE LA MONATO. Ĉiumonate EMISTUDIO donas premion al bona esperantisto. Gesamideanoj bonvolu sendi al Emistudio nomon de inda esperantisto kun klarigo kial tiu indas ricevi kaj premion kaj "bukedon". Tiu kun la plej granda kvanto de proponintoj gajnos. La premio estas la varo supre reklamita.

**ROZBUKEDON KAJ PREMION GAJNAS ĈI-MONATE
DES HACKETT EL KANADO**

EMISTUDIO 765 Braemar Avenue, Sidney, BC V8L 3S1, Kanado.

Marjorie Boulton Poul Thorsen


DU EL

Duela duopo de du famaj esperantistaj poetoj prezentas komunan 250-paĝan volumon de humurplena kaj socikonscia poezio.

Aperu do la eta bebo
post nia cerbopara strebo;
ĝi foje ploros, foje ridos,
kaj, se bizare ĝi hibridos,
por tiu frukto de redakto
neniam plu necesos lakto,
nek seka tuk'; ĝi nur surbrete
dormos kontente kaj kviete;
do, brave venu tuj aĉete.

(El Pri ĉi tiu libro de Marjorie Boulton)

Eldonis TK/Stafeto, Antverpeno/La Laguna, 1985. 250p. Ilustrita de Jean Bomford. 22cm. ISBN 90 6336 033 9. Prezo: 33,00 gld. Rabato de unu triono por samtempa mendo de minimume tri ekzempleroj de Libroservo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando.



SUK

Someraj Universitataj Kursoj

interesiĝas pri universitatnivelaĵ prelegantoj por siaj sesioj. Proponon pri temo kaj tempo (julio-aŭgusto 1986). Kompetentaj universitatanoj bonvolu skribi al:

Sekretario de SUK
José Jacob
B.P. 62
LIÈGE 10, Belgio

Estas mendeblaj 34 Kursotekstoj (KT) kaj 4 Kajeroj (KJ) ĉe la sama adreso. Petu la senpagan liston.

ACTA INTERLINGUISTICA

**Scienca interlingvistika simpozio
prelegaro de**

V. Barandovska, M. Duc Goninaz, B. Golden, A. Golonka, B. Jędrzejczyk-Rokicka, Z. Kornicki, J. Leyk, F. Lo Jacomo, S. Revesz, R. Rokicki, G. Silber, F. Simmonet, T. Tyblewski kaj B. Wacha prezentitaj dum

**la 11a Scienca Interlingvistika Simpozio,
okazigita en Varsovio en 1983.**

Red. Ryszard Rokicki. Varsovio: Akademickie Centrum Interlingwistyczne, 1984. 160p. 21cm. Prezo: 18,00 gld. (plus sendokostoj). Mendu ĉe Libroservo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Nova aventuro de Tinĉjo:

LA SEKRETO DE L' UNUKORNULO

povas aperi, SE ni rapide finvendas la 2 000 ekz. de

LA KRABO KUN ORAJ PINĈILOJ,

kiuj ankoraŭ kuŝas ĉe la eldonisto post 4 jaroj... Mendoj por netranspagipovaj aŭ triamondaj landoj kostas nur po 26 FrF. (anstataŭ 34,50 FrF.) plus 6 FrF. por sendkostoj. Donacu ĝin al viaj korespondantoj! Rabatoj: ekde 5 ekz. 20%; ekde 50 30%; + 10% por sendkostoj.

ESPERANTIX®, B.P. 40, F-75721 PARIS CEDEX 15, FRANCIO
Pĉk.: Paris 2007.47 J. ☎ 33 (1) 4558 4112.

